der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

24. Jahrgang Nr. 150 (4/1988) ISSN 001 4-0619 30 Pf

Okaze de la 80-jariĝo de UEA

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
bazaj informoj

1. UEA fondiĝis en 1908. Ĝiaj **celoj,** laŭ la statuto de 1980, estas jenaj:
a. disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto;
b. agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon;
c. plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo;
ĉ. kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidaro, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.

2. **Membraro de UEA:** UEA havas kaj aligitajn kaj individuajn membrojn.

2.1. La **aligitaj membroj** estas tiuj membroj de aliĝintaj Landaj Asocioj de UEA, kiuj ne estas samtempe individuaj membroj de UEA. Por la aligitaj membroj la Landa Asocio pagas malaltan kotizon. En 1987 UEA havis 36 351 aligitajn membrojn.

2.2. La **individuaj membroj** de UEA pagas jaran kotizon por ricevi servojn rekte de UEA. Ĉiu individua membro de UEA ricevas la Jarlibron aŭ la Gvidlibron, depende de la kategorio. En 1987 UEA havis 7 291 individuajn membrojn. La landoj kun plej multe da individuaj membroj estas Francujo (665), FR Germanujo (516), Nederlando (443), Usono (428), Japanujo (411), Brazilo (410), Svedujo (400) kaj Britujo (346). Entute, en 1987 UEA havis **46 186** membrojn en 101 landoj.

3. **Landaj kaj fakaj asocioj:** krom la membrojn, la strukturo de UEA entenas ankaŭ **landajn Esperanto-asociojn** kaj **fakajn asociojn.**

4. **Eldonaĵoj:** la **revuo Esperanto** estas la monata oficiala organo de UEA. Ĉiu 24-paĝa numero entenas raportojn pri okazintaĵoj, artikolojn pri la movado kaj rilataj temoj, resumojn kaj recenzojn pri laste aperintaj verkoj en (aŭ pri) Esperanto, kaj multajn utilajn informojn por movadaj aktivuloj. La **Jarlibro** estas manlibro pri la Esperanto-movado. La **Gvidlibro** estas depresaĵo el la Jarlibro sen la Delegita Reto. La bulteno **„UN kaj ni"** raportas pri la agado ĉe internaciaj kaj interŝtataj organizoj. **Esperanto-dokumentoj** funde analizas elektitajn movadajn temojn; ili aperas en Esperanto, la franca kaj la angla. **„Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado"** traktas la lingvoproblemojn, el vidpunktoj sociologia, ekonomia, lingvistika ktp. La **Katalogo** listigas praktike ĉiujn Esperantajn librojn, periodaĵojn, diskojn, kasedojn kaj aliajn varojn, kiuj estas akireblaj en la merkato. Laŭokaze UEA eldonas **konsilarojn pri agado, informilojn** pri diversaj temoj ktp. Krome, UEA **estas** eldonanto de **libroj.**

5. **Kongresoj kaj konferencoj:** ĉiujare UEA organizas Universalan Kongreson (UK). Kutime aliĝas inter 1 000 kaj 3 000 personoj. Partoprenas plimulto de la asocioj kaj institucioj de la Esperanto-movado. En ĉiu kongreso oni organizas inter 150 kaj 200 programerojn de diversaj specoj: laborkunsidoj, seminarioj, kulturaj aranĝoj, distraĵoj ktp. Lige al la kongreso oni prizorgas vojaĝojn al ĝi, loĝigon, turismajn programojn kaj aliajn servojn. Samtempe kun la UK okazas **Infana Kongreseto.** Fojfoje UEA organizas aŭ partoprenas aliajn internaciajn kunvenojn, de diversaj specoj, movadajn aŭ nemovadajn.

6. **Kunordigo:** al asocioj kaj aliaj instancoj en la Esperanto-movado UEA donas konsilojn pri agado, proponas prioritatojn, kunordigas diversajn komunajn projektojn ktp.
Per prezentoj en la Jarlibro, UEA informas la Esperantan publikon pri la diversaj asocioj kaj institucioj en la Esperanto-movado. UEA funkciigas interŝanĝon de spertoj kaj de ideoj pri agado, per raportoj pri la agado en la revuo Esperanto, per diversaj kunvenoj en la Universala Kongreso, kaj laŭokaze per aliaj kunvenoj kaj eldonaĵoj.

7. **Regiona agado:** UEA klopodas subteni la agadon por Esperanto en mondpartoj, kie ekonomia nivelo, transpagaj malfacilaĵoj k. s. malhelpas la agadon, kaj kie la agantoj estas geografie izolaj de aliaj esperantistoj. UEA tenas kontaktojn kun la aktivuloj en tiuj landoj, donas konsilojn pri agado, peras korespondkontaktojn, organizas ĝemeliĝojn inter kluboj, aranĝas korespondkursojn, eldonas kaj provizas lernolibrojn, vortarojn kaj informilojn, ktp.

8. **Eksteraj rilatoj:** aparta oficejo de UEA en Novjorko (Usono) prizorgas la kontaktojn de UEA kun **Unuiĝintaj Nacioj** (UN), kaj kun ties instancoj. UEA reprezentiĝas en multaj kunvenoj de UN, kaj flegas kontaktojn kun la landaj misioj.
Kun **Unesko,** la Organizo de UN pri Edukado, Scienco kaj Kulturo, UEA havas formalajn rilatojn en kategorio B, informaj kaj konsultaj rilatoj. UEA reprezentiĝas en konferencoj kaj laborkunsidoj de Unesko, kaj estas ofte petata doni konsilojn aŭ kunlabori pri komune interesaj demandoj.
UEA havas ĝeneralajn kunlaborajn rilatojn kun la **Organizo de Amerikaj Ŝtatoj,** kaj aktivas por informado ĉe la **Eŭropa Komunumo,** la **Movado de Neutraliĝintaj Landoj,** la **Monda Federacio de Asocioj pri UN,** la **Monda Organizo pri Turismo,** kaj laŭokaje ĉe interŝtataj kaj internaciaj organizoj kaj konferencoj. Fojfoje UEA mem iniciatas konferencojn por tiaj organizoj, aŭ partoprenas en ilia organizado.

9. **Kulturo kaj edukado:** UEA funkciigas diversajn agadojn, kiuj celas altigi la lingvan nivelon kaj kontribui al internacia kultura interŝanĝo: belartaj konkursoj, internacia ekzameno, lingva servo, kongresa universitato, seminarioj, magnetofona servo, koresponda servo kaj aliaj servoj, kongresaj programoj kaj eldonaĵoj.

10. **Delegita reto:** 2 305 delegitoj, en 69 landoj, proponas personajn servojn de multaj diversaj specoj: turisma informado, helpo dum vojaĝoj, respondoj al fakaj demandoj, konsiloj pri teknikaj problemoj ktp. Krome, multaj delegitoj mem iniciatas diversajn agadojn, eluzante la fakton, ke en multaj agadoj delegito estas loka reprezentanto de UEA. Kvardeko da ĉefdelegitoj kaj perantoj helpas en la superrigardado kaj kunordigo de la delegita reto.

11. **Administrado:** la Centra Oficejo de UEA, en Roterdamo (Nederlando), faras la ĉefan parton de la administraj laboroj bezonataj por la agadoj de UEA kaj por la kunordigo de tiuj agadoj. Tio inkludas i. a. administradon de adresaro kun pli ol 20 000 adresoj, klasifikitaj laŭ proks. 100 kategorioj (membrecoj, abonoj, postenoj k. s.), kaj de financoj, kun proks. 2 000 kontoj.

Trankvila kaj laborplena jubilea fermo

La 73-a Universala Kongreso en Rotterdam

Jam okazis entute 4 Universalaj Kongresoj en Nederlando. 1920 — Den Haag, 1954 — Haarlem, 1964 — Den Haag, 1967 — Rotterdam. La alta protektanto estis la Ĉefministro de Nederlando R. F. M. Lubbers. Partoprenis 2 300 personoj el 63 landoj.

La kongresa semajno por la aktivuloj de UEA komenciĝis sabate la 23-an de julio per **movadologia seminario** okaze de la 80-jariĝo de Universala Esperanto-Asocio en la moderna kongrescentro de Rotterdam „de Doelen". Sub la slogano „UEA — al nova strategio por nova jardeko" diskutis kelkaj konataj personoj de la nuntempa Esperanto-movado. La simpozion preparis kaj gvidis la redaktoro de la revuo „Esperanto", Mark Fettes. Al la parolintoj apartenis Ulrich Lins (FRG), Humphrey Tonkin (Usono), Kees Ruig (Nederlando), Edward Symoens (Belgio), Jila Shaheb-Zamann (Irano), Renato Corsetti (Italio), Karen Lindquist (Svedio), Probal Daŝgupto (Hindio), François Lo Jacomo (Francio) kaj Detlev Blanke (GDR). La laste menciita skizis etapojn de instituciigo de interlingvistikaj aktivadoj en landa kadro. La **inaŭguro** estis kutima, kun bonega festparolado de d-ro John Wells el Britio. Mankis diplomatoj. Ilin oni invitis por **marda festkunveno,** dum kiu post diapozitiva spektaklo de UEA oni solene fermis la jubilean jaron resumante la ĉefajn atingojn.

La **kadra temo** de la kongreso estis „Scienco kaj tekniko por internacia kompreniĝo", sub la gvido de la hinda lingvisto d-ro Probal Daŝgupto kaj post kadraj prelegoj de li kaj prof. Otto Haszpra la temo estis pritraktita en diversaj laborgrupoj dum la kongresa semajno. La komitato de UEA akceptis ĉi-rilatan rezolucion. Al la klariga parto de la kongreso ne nur apartenis la trakto de la ĉeftemo, sed ankaŭ la tradicia **Internacia Kongresa Universitato,** kies 41-a sesio okazis ĉijare sub la rektoreco de la konata nederlanda afrikanisto prof. d-ro Jan Knuppert. Prelegis d-ro John Wells (lingvoj de okcidenta Azio), d-ro Arpád Máthé (natura medio), prof. d-ro Humphrey Tonkin (lingva problemo kaj universitatoj), d-rino Maria Rafaela Urueña (internacia juro), d-ro Vilmos Benczik (literaturteorio), d-ro Hans Michael Maitzen (astronomio), d-rino Vera Katarina Barandovská (Komenio pri internacia lingvo), Ilona Koutny (parolanta komputilo), d-ro Probal Daŝgupto (gramatika temo), A. P. M. Toon Witkam (DLT), d-ro Werner Bormann (komerco), prof. d-ro Haszpra (medioprotektado kaj hidromekaniko). La **11-a Esperantologia Konferenco** sub gvido de la DLT-eksperto d-ro Klaus Schubert diskutis rilatojn inter ĝenerala lingvistiko kaj esperantologio. Troviĝante en Nederlando, kie prosperas la projekto de duonaŭtomata tradukado (DLT, komparu „der esperantist" 1/88) kompreneble la intereso pri la afero estis granda. Pro tio la DLT-teamo post la kongreso okazigis kurson pri tiurilataj lingvistikaj problemoj. Ankaŭ eblis admiri kaj eĉ klavopremi la parolantan komputilon, kiun prezentis Ilona Koutny el Budapest. Laŭ la sistemo Esparol la komputilo povas prononci ĉiun ajn tekston tajpitan sur la klavaro, eĉ paroli rapide aŭ malrapide, flustras kaj kantas (!!).

[daŭrigo de p. 74]

12. **Libroservo:** la libroservo de UEA, kiu kuŝas en la Centra Oficejo, peras praktike ĉiujn Esperantajn librojn, periodaĵojn, diskojn, kasedojn, filatelaĵojn kaj aliajn varojn, kiuj estas akireblaj en la merkato. Membroj de UEA kaj libroservoj ricevas katalogon rekte, aliaj ricevas ĝin laŭ mendo.

[El „Jarlibro de UEA", Rotterdam, 1988, p. 14 — 16]

Tre grava por la scienca-teknika kaj alifaka apliko de Esperanto sendube estas bonkvalita terminologio. Rüdiger Eichholz el Kanado povis prezenti la preskaŭ 900-paĝan verkon „Esperanta Bildvortaro", kiu entenas terminojn por ĉ. 25 000 objektoj. Bone vizitita estis la **2-a Konferenco de Terminologia Esperanto-Centro de UEA (TEC),** kiu estis fondita dum la jubilea kongreso en Varsovio. La konferenco, sub la gvido de d-ro D. Blanke, diskutigis multajn fakulojn pri principaj problemoj de pli sistema kaj kunordigita aktivado sur ĉi tiu grava kampo.

Dum la kongreso okazis krome la **Tago de la Lernejo, kursoj** por la nederlanda lingvo, **prelegserio pri Nederlando** kaj aliaj klerigaj programoj. Kompreneble kunvenis la diversaj **fakaj asocioj kaj organizaĵoj,** inter ili la artistoj, ateistoj, aŭtomobilistoj, blinduloj, etnistoj, evangeliaj kristanoj kaj katolikoj, fervojistoj, filatelistoj, filologoj, filozofoj, go-ludantoj, instruistoj, komerc-ekonomiistoj, kooperativanoj, matematikistoj, medicinistoj, muzikistoj, naturistoj, poŝtistoj, radio-amatoroj, sciencistoj, skoltoj, vegetaranoj, verkistoj kaj veteranoj. Do, bunta panoramo de faka apliko.

Aparte grava ankaŭ estis la aktivecoj ĉirkaŭ la Malinowski-plano pri la **Esperanto-Centro en Bialistoko.** Jam elektiĝis arkitekta projekto, kiu estis rigardebla dum la kongreso. Partoprenis la urbestro de Bialistoko kaj la vojevodo pri Kulturo. Konfirmiĝis estraro de la **Fondumo Zamenhof,** kiu havas la taskon gvidi la starigon de la Centro. Al la 11-kapa estraro de la Fondumo apartenas el GDR d-ro D. Blanke, kiu okupiĝos pri la scienca flanko de la Centro. Dum la kongreso oni povis aĉeti koloran ekstran eldonon de la gazeto „Kurier Podlaski" (Bialistoko) kun informoj pri Bialistoko kaj la Centro. Ĉiu aĉetinto havos la ŝancon gajni senpagan restadon en Bialistoko. Daŭriĝis la tre bona tradicio, ke dum la kongreso okazas **„Tago de Paco".** Ĝi ĉi-jare havis la kadran temon „Paco, ekologio, socia justeco". La temo de ĉi tiu aranĝo por 1989 estos „Esperanto kiel ilo de pripaca edukado". Ankaŭ okazis **kunsido de MEM.** Ambaŭ pacaranĝoj ebligis diskuton de vere aktualaj problemoj de la homaro. Dum la MEM-kunveno fariĝis evidenta, kio ankaŭ rilatas al la revuo „Paco", se MEM ne volas fariĝi tute sensignifa sekto, ĝi devas decide ŝanĝi sian stilon kaj draste adaptiĝi al normoj kaj kutimoj de la aktuala internacia pacmovado. Aranĝoj sen klara tagordo kaj koncepto (sed kun preparita rezolucio, kiun neniu povis memori, ĉar ne multobligita), ne havas estontecon.

Riĉa, kiel kutime, estis la **kultura programo:** nacia vespero, internacia vespero, jazkoncerto, prezentaĵo de „Bulgara Esperanto-Teatro (Pančo Pančev „Fabeloj pri la kalpakoj"), pupteatro el Bialistoko (Dekamerono), „La neĝa blovado" de Puŝkin prezentita de nur unu aktoro (Kazimierz Mazur), diversaj filmoj, koncertoj. Sendube sensacia estis la prezento de la mondfama hungara okcidentgermana filmo „Mefisto" en bona Esperanta sinkronigo.

Ni ne forgesu mencii la **infanan kongreseton,** kies partoprenantoj aparte ĉarmis dum la jubileferma festaranĝo. Tiuj, kiuj ankoraŭ ne konis la **Centran Oficejon de UEA** en Rotterdam povis konatiĝi kun la administra koro de UEA en Nieuwe Binnenweg 176. Tie agadas 10 oficistoj sub la gvido de la Ĝenerala Direktoro Simo Milojević kaj la Direktoro Neil Salvesen.

La **Komitato de UEA** kunsidis ĉirkaŭ 20 horojn por diskuti la priagadan raporton (1987), la novan strategian planon de UEA kaj multajn aliajn tagorderojn. Lige al la kongreso oni prezentis la aperon de du gravaj libroj de Ulrich Lins, konata historiisto el FRG: „Die gefährliche Sprache" (328 p.) kaj „La danĝera lingvo" (548 p.). Ambaŭ libroj traktas la persekuton de esperantistoj, i. a. sub Hitler kaj Stalin. (Recenzoj okaze aperos en „der esperantist"). Ĉiutage apris **kongreskuriero,** kies titolo ĉiam rilatis al CO (= Centra Oficejo), do nomiĝis Prefa-CO, Komen-CO, Hejme-CO, La-CO, Pa-CO, Apre-

REZOLUCIO PRI SCIENCO KAJ TEKNIKO

La 73a Universala Kongreso de Esperanto

diskutinte diversajn aspektojn de la rolo de la scienco kaj tekniko en la formado de la estonteco de la homaro, kaj

konstatinte — kiel aliaj racie pensantaj homoj ĉie en la mondo — ke la plua disvolvado kaj paca aplikado de la scienco kaj tekniko estas nemalhavebla bazo por la evito de la detruiĝo de la biosfero, por la saĝa mastrumado de la naturaj rimedoj, por la sekurigo de sanaj biologiaj vivkondiĉoj kaj por la plua socia kaj kultura evoluo de homaro, krome

ke la sociaj kaj naturaj sciencoj kaj la scienca tekniko estas laŭesence internaciaj kaj plej altgrade bezonas senperajn, vastajn kaj facilajn kontaktojn, informo-interŝanĝojn, vivajn diskutojn kaj homan interkompreniĝon tiel inter siaj kultivantoj kiel inter tiuj kaj la nesciencistaj amasoj,

konkludis, ke la esperantistaro devas tutanime apogi la pluan disvolvadon kaj disvastigon de la scienco kaj tekniko kaj — kune kun la neesperantistaj amasoj — aktive partopreni ĉiunivele en la diskutoj pri, kaj agoj por, la konscienca, respondeca kaj plej celhava aplikado de ties rezultoj;

refirmigis, ke la Rezolucio pri Faka Aplikado akceptita okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en Pekino en 1986 — kiu pleje emfazis la neceson pri la intensa utiligo de Esperanto en la sciencoj kaj tekniko kaj pri la aktiva kunlaboro ankaŭ en kaj kun la neesperantista scienca medio — estas ĝusta kaj ties plenumon UEA kaj ties membroj devas pli intense daŭrigi kaj sukcesigi.

---

daŭrigo de p. 76

CO. La tuta kongreso glate kaj senprobleme funkciis, kion oni danku unuavice al la 10-kapa **Loka Kongresa Komitato** sub gvido de Ans Bakker-ten Hagen.
El GDR ĉeestis entute 11 personoj, inter ili kiel oficialaj reprezentantoj de GDREA (kaj membroj de la Komitato de UEA) Hans Heinel kaj d-ro Detlev Blanke. Aliaj 9 personoj partoprenis proprakoste private.

La 74-a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 29-a de julio ĝis 5-a de aŭgusto en Brighton, Grandbritio. **D. B.**

Rosen Trenner 1930 — 1988

La 19-an de oktobro 1988, post longa suferplena malsano, forpasis la instruistino Rosen Trenner, la prezidantino de la Distrikta Estraro Potsdam de GDREA, membro de la Centra Estraro. Ni perdas energian, tre helpeman kai varmkoran virinon, kiu gajnis ĉies stimon kaj simpation. Nia asocio kunsente kondolencas al la familio kaj rememoros pri Rosen kun profunda estimo.

CE de GDREA

Rezolucio

de la „Tago de la Paco" dum la 73-a UK en Roterdamo

Ĉeestinte la 5-kaj-duon-horan programon de la „Tago de la Paco", kun la temo „Paco, Ekologio, Socia justeco", **aŭskultinte** dekon da kontribuaĵoj de diverslandaj referantoj pri la temo,

spektinte similtemajn filmojn el 5 landoj,

subtenante la rezolucion de la MEM-kunsido pri plifortigo de la kampanjo kontraŭ vetarmado,

kaj **diskutinte** la komunan rolon de esperantistoj en la realigado de la supra temo, ni konstatas,

1) ke la programo „Tago de la Paco" fariĝas nemankipova parto de la ĉiujara U.K., kaj sekve ĝi restu daŭre integra parto de la kongresa programado,
2) ke esperantistoj devas esti kompetentaj servi al pli aktuala kaj akurata fluado de informoj pri diversaj okazaĵoj en ĉiuj partoj de la mondo rilatantaj al la komuna sorto de la homaro transvivi jam komenciĝantan detruprocedon de la homa medio kaj socia justeco,
3) ke en la dua jarcento de Esperanto ni celu la tutmondan informadon pri pozitiva evoluado de la vivo pere de reciproka respekto al ĉiuj estaĵoj kaj naturaj leĝoj kiel unu el la prioritataj agadkampoj de esperantistoj, kaj

tiucele ni prezentas al esperantistoj ĝenerale kaj al la Komitato kaj la Estraro de UEA specife, jenajn konkretajn proponojn:

1) fondi apartan celgrupon inter esperantistoj ĝenerale kaj komisionon ene de UEA specife, kiu kune kun la samcelaj institucioj kaj grupoj antaŭenigu la kampanjon por mediprotektado kaj gardado de socia justeco, utiligante la lingvon internacian kiel interkomunikilon,
2) eldoni serion de tiutemaj broŝuroj kaj alvokiloj en la internacia lingvo, ekz. Esperanta traduko de la Deklaracio pri Homa Medio proklamita de UNO en Stokholmo en 1972, kiel unu el la bazaj materialoj de la kampanjo,
3) kaj alpreni la temon „Esperanto kiel ilo de pripaca edukado" por la venonta „Tago de la Paco" en Brajtono, 1989.

35-jara jubileo de MEM en Hanojo

Ja 16an de julio 1988, Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA), Vjetnama MEM-Sekcio, organizis kunvenon jubilante la 35-jaran datrevenon de Mondpaca Esperantista Movado (MEM).
En tiu solenaĵo ĉe la Amikeca Domo en Hanojo, partoprenis proksimume 200 reprezentantoj de diversaj organizoj partiaj, popolamasaj, gazetaraj kune kun la esperantistoj kaj E-lernantoj en la ĉefurbo.
La konata sovetia esperantista aktivulo Dimitri Perevalov, funkciulo de la gazetara agentejo APN, restadis dum la somero 1988 2 monatojn en Hanojo. Li prelegis antaŭ 500 klubanoj en la Vjetnama-Sovetia Amikeco-Kultura Palaco, kie ankaŭ helpe de la Estraro de tiu Kultura Palaco-Domo, kaj de tre agemaj kaj aktivaj esperantistoj oni sukcesis fari ekspozicion pri diversaj E-eldonaĵoj. Kaj kunlaborante kun la responsuloj de tiu Kultura palaco, VPEA povos malfermi E-kurson, preparante la fondiĝon de ties Esperanto-Klubo.

Dang Dinh Dam

44-a TEJO-Kongreso en Zagreb

Ĉirkaŭ 700 gejunuloj el 46 landoj kunvenis en la jugoslavia urbo Zagreb por okazigi sian 44-an kongreson. El GDR partoprenis Torsten Bendias, prezidanto de la Junulara Sekcio de GDREA kaj Sabine Trenner, membro de la JS. La kongresa temo tre montris en la estontecon „Komunikado en la 21-a jarcento". Al ĉi tiu temo estis dediĉitaj multaj prelegoj kaj aranĝoj. Ekzistis kongresa televido ĉiutage spektebla, ĉiutage Esperantaj disaŭdigoj de Radio Zagrebo, kongresa gazeto k. s. Grupoj ellaboris softvaron (programaron) aŭ produktis videofilmojn. Dum la kongreso aktivis internacia koruso, popoldanca grupo, amatora teatro, Esperanto-metodika kurso (Zagreba Metodo), lingvokurso por la kroata k. s. Abundis diversaj fakgrupoj.

La Komitato de TEJO trifoje kunsidis en la pleno kaj krome en komisionoj. Estis rimarkebla la klopodo aferece kaj koncentrite trakti la grandan tagordon. Komisionoj traktis apartajn aspektojn de la agade de TEJO, ekz. landa agado, kongresoj, kulturo kaj scienco, financoj, eksteraj rilatoj. TEJO plifortigos sian kunlaboron kun neesperantistaj internaciaj organizaĵoj. Akceptiĝis du novaj landaj sekcioj: la Katalana Esperanto-Junularo kaj la Madagaskara Esperanto-Junularo (reakcepto). Ankaŭ el Zairo ekzistas intereso aliĝi al TEJO, sed ankoraŭ mankis iuj formalaĵoj. La komitato de TEJO elektis Jan Koszmaluk kaj Martin Haase kiel siajn reprezentantojn en la komitato de UEA.

La 45-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos dum la sekva somero 1989 en Kerkade/Nederlando, kaj 1990 oni kongresos en Kubo.

(Laŭ T. Bendias)

Denove en Szeged

Inter la 10a kaj 16a de julio HEJ organizis sian jam tradician Internacian Junularan Semajnon en Szeged. Partoprenis 140 gejunuloj el 16 landoj (25 GDRanoj) — inter ili ankaŭ multaj tendemuloj — kiuj travivis riĉvarian buntan programon.

Lunde ni partoprenis hungarlingvan kurseton aŭ urborigardon per buso. Sekvis vespere unu kulmino el multaj: la tradicia balo. Ankaŭ ne mankis magiisto kaj pantomimo — kaj kompreneble multe da muziko. Sekvonttage ĝojigis nin la Leningrada koruso „Eterna Muziko" per buntmiksita kantado. Post tiu vere aŭdinda programeto ni komune ekmarŝis al (nokt)banejo.

Purrasajn ĉevalojn ni povis merkrede admiri (kaj eĉ rajdi!) aŭ riĉan libro-oferton en la urba biblioteko. Komenciĝis ankaŭ interesa diskutrondo pri diversaj temoj, daŭrigita vendrede. Do — kompreneble ni ĉiuj preparis nin por la internacia vespero — kun granda sukceso. Ni ankaŭ jesis la devizon: Enpaku bankostumon . . . kaj kuniru al Sziksós-lago! Bivakfajro kronis nian lastan vesperon. Iomete malgaje ni adiaŭis niajn forlasemulojn, kiuj per organizita aŭtobuso ekveturis al IJK. Kio ankoraŭ okazis? Ekskursoj, (video-) filmoj, lumbildprelegoj, librovendado . . ., eĉ internacian futbalmaĉon ni povis vidi — sed ankaŭ ĉagreniĝi pri kelkaj krokodiloj.

Pro la tre sukcesa aranĝo dankas al la organizintoj en la nomo de la ĉeestintaj GDRanoj

Sylvia Lassika.

Klarigoj:
HEJ — Hungara Esperanto-Junularo
IJK — Internacia Junulara Kongreso

INTERNACIA KORESPONDA SERVO

helpos al Vi trovi korespondant(in)on, aŭ partner(in)on. Por pluraj informoj sendu unu internacian respondkuponon al: Box 163 Stn. „A" Downsview, Ont. M3M 3A3 Canada

Raporto pri la agado de la Soveta MEM-Sekcio dum la periodo 1985-1987

La sovetiaj esperantistoj konsideras pacagadon kiel sian ĉefan taskon. Do en aranĝoj efektivigataj laŭ iniciato de Sovetia MEM-Sekcio, partoprenas plejparto de membroj de la E-kluboj. Por gvidi tiun laboron enkadre de la kluboj estas elektataj respondeculoj pri MEM-agado kaj ofte grupoj de aktivuloj. En ĉiuj respublikoj, kie ekzistas ASE-filioj, funkcias ankaŭ filioj de Sovetia MEM-Sekcio. El la plej aktivaj oni povas nomi tiujn de Ukrainio, Litovio, Estonio, Armenio.

Fine de 1985 laŭ iniciato de Moskva Centra Esperanto-Klubo, subtenita de Sovetia MEM-sekcio, multaj kluboj partoprenis en kolektado de subskriboj sub alvokoj al la registaroj de Usono, Britio, Francio, FRG kaj Japanio subteni moratorion pri nukleaj eksplodigoj kaj ne partopreni en la planoj de militismigo de la kosmo. Dum mallonga tempo estis kolektitaj po 22 mil subskriboj [do entute pli ol 100 mil], poste transdonitaj al la registaroj de la menciitaj landoj. Tekstoj en ĉiu folio de la alvoko estis skribitaj en la rusa, Esperanto kaj lingvo de la koncerna lando. Pluraj sovetiaj kluboj partoprenis ankaŭ en kolektado de subskriboj sub alvoko pri nuklea malarmado „Hirošima — Nagasaki". Ekzemple, esperantistoj de Ĉeljabinsk kolektis pli ol 2 mil subskribojn.

La sovetiaj esperantistoj aktive partoprenis en la agadoj kadre de Internacia renkontiĝo „Esperantistoj por la paco kaj malarmado" aprile 1986 en Volgograd kun pli ol 300 partoprenantoj. Krom sovetianoj en ĝi partoprenis esperantistoj el Aŭstrio, Belgio, Britio, Bulgario, Ĉehoslovakio, GDR, Hungario, Japanio, Jugoslavio, Kanado, Pollando, Rumanio, Usono, Vjetnamio. La renkontiĝo estis tre reprezenta — al ĝi venis gvidantoj de MEM kaj landaj MEM-sekcioj, landaj E-Asocioj, ankaŭ reprezentantoj de UEA kaj KEK. Grave helpis al sukcesigo de la renkontiĝo SSOD [Unuiĝo de societoj por amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksterlando].

Sovetiaj esperantistoj aktive partoprenis en „Tago de Paco" kaj MEM-kunveno kadre de la jubilea UK en Varsovio.

Aktivuloj de Sovetia MEM-sekcio regule organizas labortagojn kaj monkolektadojn por Sovetia Pacfonduso. Tiuj aranĝoj iĝis tradiciaj dum diversaj tendaroj, renkontiĝoj, seminarioj. Ekzemple, konstante estas organizataj libervolaj monkolektadoj por la Pacfonduso dum tutlandaj seminarioj de blindaj esperantistoj.

Dum enlandaj tendaroj, seminarioj plioftiĝas prelegoj, diskutoj pri problemoj de paco kaj malarmado. Aparte menciindas jam tradicia ĉiujara seminario „Paco, scienco, Esperanto" en Leningrad.

Eksterlandaj esperantistoj ĉerpas informojn pri la sovetiaj paciniciatoj el Esperanto-publikaĵoj de moskva Eldonejo APN. El la aperintaj dum la lastaj jaroj eldonaĵoj oni povas mencii tiujn programajn por la pacagado materialojn kiel „Deklaro de Ĝenerala Sekretario de CK KPSU M. S. Gorbaĉov, 1986-01-15", „Politika raporto de Centra Komitato de KPSU al la 27a Kongreso de la partio", la artikolo de M. Gorbaĉov „Realo kaj garantioj de la sekura mondo".

La pactemoj ofte estas respegulataj en „Horizonto de Soveta Litovio", en artikoloj, preparataj de sovetiaj esperantistoj por alilandaj E-periodaĵoj, inkluzive „Pacaktivulo" kaj „Paco".

Multaj kluboj sendas porpacajn eldonaĵojn de APN al siaj eksterlandaj partneroj. Aktive partoprenas en tiu

laboro kluboj de Leningrad, Krasnodar, Magadan, Minsk, Nijnevartovsk, Volgograd k. a.

Gravaj porpacaj publicajoj en Esperanto baldaŭ aperos en alia moskva eldonejo — „Progreso". Inter ili la libro „Trarompo" — kolekto de artikoloj de sovetiaj kaj usonaj aŭtoroj pri la problemoj de malarmado [komuna eldono de „Progreso" kaj la kuba eldonejo „José Marti"]. Estas planata ankaŭ bildlibro „Militu kontraŭ milito".

En multaj sovetiaj gazetoj, revuoj, televido, radio aperas informoj pri pacagado de esperantistoj, ofte estas menciata MEM. Ekzemple, pri la ekspozicioj de Esperanto-literaturo dum la jubilea jaro en Moskvo, kie estis aranĝitaj apartaj standoj pri MEM, informis Moskva televido. Centra televido de USSR rakontis pri la ekspozicio de infanaj desegnajoj „La infanoj de la mondo — por la paco kaj malarmado", organizita en dagestana urbo Mahaĉkala fare de la loka E-klubo.

Similajn ekspoziciojn organizas multaj Esperanto-kluboj. Ekzemple, E-klubo en Rostov-Don aranĝis ekspozicion de kontraŭmilitaj desegnajoj de la konata ĉeĥoslovakia esperantisto-pentristo Pavel Rak. Fotoekspozicio „Esperanto servas pacon" estas organizita en Vitebsk. Esperanto-klubo en Jalta organizas porpacajn ekspozicion de afiŝoj „Paco estas afero de ĉiuj kaj de ĉiu". Ofte organizas porpacajn ekspoziciojn la E-klubo en Samarkand. Laŭ iniciato de tiu Klubo en Samarkand estas Kreita „Muzeo de Paco" kaj Solidareco". Multaj eksponajoj por la muzeo estas senditaj de esperantistoj el diversaj landoj. Pri la kreo de la muzeo informis multaj sovetiaj amasinformiloj. Multaj kluboj prezentas al la publiko prelegojn kaj koncertojn, dediĉitajn al la pacagado. Ekzemple, E-ensemblo „Inspiro" en Jalta organizis 50 kontraŭmilitajn koncertojn por pluraj miloj da spektantoj. Similajn koncertojn prezentas ankaŭ kluboj en urboj Ĥmelnickij, Samarkand, Tallinn, Tomsk, Vitebsk, Vorošilovgrad. Porpacaj temoj okupas gravan lokon en programoj de la tradicia arta konkurso „Muzo" en Vilnius. Grandan impreson portas al publiko kontraŭmilitaj slajd[6])filmoj, prezentataj de la kluboj en Ĉeljabinsk, Kujbišev, Magadan, k. a.

Pluraj sovetiaj kluboj partoprenis aŭtune 1987 aranĝon kadre de la tutmonda kampanjo „Ondo de Paco". Esperantistoj partoprenis mitingojn, manifestaciojn, porpacajn subskribojn, koncertojn, ekologiajn laborojn.

Sovetia MEM-sekcio lanĉis kampanjon por helpi al infanoj de Nikaragvo. La kluboj organizas monkolektadojn, labortagojn tiucele. Ekzemple, esperantistoj de Mahaĉkala organizis labortagon, dum kiu oni perlaboris 3 mil rublojn. Laborantoj de la Eldonejo APN kolektis pli ol 1 mil rublojn. Tradukintoj kaj redaktintoj de la broŝuro en Esperanto, kiu enhavas la parolon de M. S. Gorbaĉov en Beogrado [1988-03-16], transpagis al Sovetia Pacfonduso [por nikaragvaj infanoj] siajn honorariojn.

Pluraj E-kluboj sukcesis organizi intiman kunlaboron kun lokaj pacdefendaj komitatoj kaj pacfondusaj komisionoj, ekzemple, en Doneck, Leningrad, Magadan, Nikolaev, Samarkand, Vladivostok. Iuj kluboj dume ne sukcesis aranĝi tiujn kontaktojn. Ni devas aktivigi laboron tiudirekte.

Por la jaro 1988 ni antaŭvidas aranĝojn, dediĉitajn al la 35-jariĝo de MEM. Ekzemple al tiu datreveno estas dediĉita la 26-a Centra-Rusia Regiona E-Renkontiĝo apud Moskvo.

La sukcesaj unuaj paŝoj en la vojo de malarmado — subskribo de kontrakto inter USSR kaj Usono pri neniigo de du klasoj de nukleaj raketoj, la esperoj pri pozitivaj rezultoj de la baldaŭa supernivela renkontiĝo en Moskvo inspiras la sovetiajn esperantistojn al pli kaj pli aktiva agado serve al la paco kaj amikeco inter la popoloj.

Dmitrij Perevalov,
prezidanto de Sovetia MEM-Sekcio

Klarigos:
ASE — Asocio de Sovetiaj Esperantistoj
KEK — Komunista Esperanto-Kolektivo

ESPERANTO '88

Internacia Konferenco por Evoluo de Esperanto en Iberameriko, 30. 11. — 2. 12. 88 en Havano, Kubo

Kunaŭspicias:

Universala Esperanto-Asocio
Kuba Esperanto-Asocio
Akademio de Sciencoj de Kubo
Ministerio pri Kulturo
Eldonejo en Fremdaj Lingvoj „José Marti"
Kuba Kongresa Buroo
Kongresa Palaco

Estimataj gekolegoj:

„La lingvo ekzistas unue por disvastigi, due por ĝui", diris d-ro Humphrey Tonkin dum sia parolado en la solena malfermo de la 72-a Universala Kongreso en Varsovio.

La programo de la internacia konferenco „Esperanto '88" celas kunigi ambaŭ flankojn de la esperantista agado.

Post longa kaj sukcesa plifortiĝo de la E-movado ene de Eŭropo, ĝia ĉefa gvidorganizo UEA, turnas sian rigardon al la grandaj mondregionoj nome: Afriko, Azio kaj Ameriko klopodante disvastigi la internacian lingvon, per trafa kaj saĝa laborstrategio, tra la tuta mondo.

Ĝuste por kontribui iel sukcesigi la laboron de UEA en nia kontinento, Kuba Esperanto-Asocio decidis inviti la esperantistojn aktive partopreni internacian E-aranĝon.

Kvankam la celo de „Esperanto '88" estas evoluigi Esperanton en nia kontinento, ni bonvenigas tutmondajn esperantistojn, ĉar estas necese, ke la vivdona sango de la internacia E-movado atingu nin.

En „Esperanto '88" alternos kantoj kaj diskutoj, prelegoj kaj vizitoj al historiaj aŭ turismaj lokoj, laborkunsidoj kaj amikaj renkontiĝoj. Dum „Esperanto '88" regos oportuna etoso por interŝanĝi ideojn, informojn, spertojn kaj trovi vojojn al fruktodona kunlaborado.

Do, karaj gekolegoj, ni ne invitas vin nur por rigardi kaj aŭskulti, por ekskursi kaj danci, sed ankaŭ por ĝui ok tagojn laborante favore al la disvastigo kaj evoluo de nia movado tutmonde.

Nia tradicie gastema lando atendas vian viziton.

Bonvenon!

Jesús A. Castillo Jiménez
Prezidanto
Kuba Esperanto-Asocio
Informojn donos: Kuba Esperanto-Asocio. Ap. p. 2018, La Habana 2.

Erich Würker: 85-jara

La membro de la Centra Estraro de GDREA, nia Erich Würker el Reichenbach, festos sian 85-an naskiĝjubileon je la 26-a de decembro 1988. La CE de DDREA tre kore gratulas al sia energiplena, iniciatema Erich, kies ligoj al Kulturligo kaj Esperanto estas tre malnovaj. Kiel prezidanto de la iama Centra Laborrondo E-o Karl-Marx-Stadt kaj malnova membro de GLEA kaj de la CE de GDREA li kunskribis nian historion. Bonfarton kaj sanplenan estontecon! CE de GDREA

Radio Polonia en Esperanto

1988 — 1989

RADIO POLONIA disaŭdigas en Esperanto ĉiutage jam la tridekan jaron; la 4-an de aprilo 1989 oni festos la 30-jariĝon de la agado. La 3-an de majo 1988 oni enkondukis unuhoran matenan magazinon, en kiu abundas polaj kaj E-movadaj temoj.

En niaj disaŭdigoj apud novaĵoj, komentarioj pri polaj kaj internaciaj temoj, oni parolas pri soci-ekonomiaj, scienc-teknikaj, kulturaj, junularaj, turismaj, sportaj kaj muzikaj temoj, kaj ankaŭ tre vaste pri la E-movado en Pollando kaj en la movado.

LA HOROJ KAJ ONDOLONGOJ

5.00—6.00 41,27; 48,90; 50,04; 200 m
(7270, 6135, 1503 kHz)
11.00—11.25 31,50; 41,99 m
(9525, 7145 kHz)
15.30—15.55 41,18; 49,22 m
(7285, 6095 kHz)
16.30—16.55 41,18; 49,22 m
(7258, 6095 kHz)
21.30—21.55 41,18; 49,22; 50,04; 200 m
(7285, 6095, 5995, 1503 kHz)

(La horoj estas indikitaj aŭ la universala tempo — GMT, al kiu — en la landoj de la mezeŭropa tempo — vintre oni aldonas unu horon, somere — du horojn)

Konkurso de Radio Polonia

Okaze de la 70-a datreveno de la reakiro de sendependeco fare de Pollando, kio sekvis en la 1918 jaro, RADIO POLONIA anoncas konkurson kaj invitas vin tutkore partopreni en la lotumado de multaj objektaj premioj, inter kiuj troviĝas E-libroj, sonkasetoj kun E-kanzonoj kaj voĉo de la kreinto de la internacia lingvo k. a.

La fina tago de la forsendado de la respondoj pasos la 15-an de decembro 1988/decidas la dato de la poŝta stampo. La anonco de la rezultoj de la konkurso okazos la 31-an de januaro 1989.

Kaj jen la konkursaj demandoj:

1. Kion vi scias kaj kion vi eksciis pri la reakiro de la sendependeco fare de Pollando en la 1918 jaro el la elsendoj de Radio Polonia?
2. Kian rolon en la historio de Pollando ludis la eminenta artisto kaj politikisto Ignacy Jan Paderewski?

La konkursaĵojn oni sendu laŭ la adreso:

Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, 00-950 Varsovio, P.O.Box 46, Pollando.
Sur la koverto bv. aldoni la kromnoton „KONKURS".

Ni invitas vin partopreni la konkurson kaj ni samtempe petas diskonigi ĝin inter viaj gekonatoj, geamikoj, samklubanoj. Samtempe ni informas vin, ke Radio Polonia en la periodo julio-decembro multe da atento dediĉos al ĉi tiu datreveno. Aŭskultante nin vi trovas materialon por la konkursaĵoj. Sukceson!

Varsovio, en junio 1988 Radio Polonia

Renkontiĝo de amikeco en Lubniewice

La Filio Gorzów de Pola Esperanto-Asocio okaze de jam tradicia renkontiĝo al Lubniewice, 30 km. de Gorzów, invitis ankaŭ delegacion de junaj esperantistoj el la distrikto Frankfurt (Odro). Ĉi-jare la aranĝo okazis inter la 27-a kaj 29-a de majo. Partoprenis 25 personoj el diversaj polaj urboj kaj 2 gejunuloj el la ĝemela distrikto. Celo de la renkontiĝo de nia flanko estis komenci la kontaktojn kun la ĵus fondita junulara E-grupo de la mekanika uzino de Gorzów. Ni jam interparolis pri la sekvontaj celoj de komuna laboro. Kulminoj estis plurhora velboatado kaj ekskurso al la kastelo de Łagow.

Ronald Schindler

Sprachkundigenprüfung I

Die zweite Sprachkundigenprüfung Esperanto I (vgl. S. 86) findet am 2. 7. 1989 im Büro des Esperanto-Verbandes statt. Die Bedingungen sind beim Zentralvorstand erhältlich. Anmeldeschluß: 30. April 1989.

Internacia Metodika Seminario en ČSSR

La 6-a IMS okazis meze de aprilo 1988 en la eturbo Strážnice kaj estis destinita al la temo „La evoluigo de la kvar komunikkapabloj". Ĉeestis ĉ. 50 Esperanto-instruantoj el ses landoj (CS, BG, H, PL, NL, GDR) kaj estis prezentitaj pli ol 20 kontribuoj, plejparte en formo de prelegoj.
Gravan rolon en la pritrakto de la kadrotemo ludis problemoj de lernpsikologio, de ĝenerala klerigo kaj de eluzo de komputiloj. Okazis instigoriĉa spertinterŝanĝo koncerne la Esperanto-instruadon al progresintoj kaj koncerne la envicigon de Esperanto en klubojn de internacia amikeco.
Estis faritaj faka enkonduko en la programon por unueca kvalifiko de kursgvidontoj kaj analizo de la ĝisnunaj rezultoj resp. efikoj de la IMS 1 — 5 (dufoje Varsovio, po unu fojo en Bad Saarow, Gárdony, Pisanica).
Pli kaj pli elreliefiĝas tiaj aranĝoj, kiuj naskiĝis dum la ILEI-konferenco 1981 en Gödöllö (H), kiel bezonata forumo por profunde okupiĝi pri praktikaj demandoj de la nuntempa fremdlingvo-instruado sub aparta konsidero de Esperanto.
Por la venonta, 7-a IMS (aprilo 1989) estas proponita la kadrotemo „Lingvopedagogiaj aspektoj de la E-instruado", ĉar evidentiĝis, ke la instruado de Esperanto nun troviĝas en stadio de transiro al pli altaj postuloj: per Esperanto al plivastigo de la ĝenerala klereco.
Ni sincere dankas al la organizintoj de la 6-a IMS, al la Ĉeha Esperanto-Asocio kaj aparte al la gvidinto de la seminario d-rino Barandovská. **d-ro T. Dahlenburg/J. Zettier**

Jubileo en Veliko Tarnovo

En **1888** la volapukistoj en Veliko Tarnovo (Bulgario) alprenis la Zamenhofan lingvon Esperanto. Okaze de tiu memorinda evento estis organizita Semajno de Esperanto-kulturo de la 13a ĝis la 18a de majo 1988: koncerto en la urbodomo, radioelsendo, artikoloj en la urba kaj regiona gazetaroj, granda ekspozicio el filatelajoj (H. Dolĉinkov, Z. Nikolov, N. Radojĉeva, H. Abaĝiev), Esperanto-lerniloj — kolekto de H. Dolĉinkov — esperantista veterano, kiu posedas pli ol 300 lernolibrojn de la Internacia Lingvo, Esperanta literaturo (O. Cankova).
La bulgara televido reehis al la 100-jara jubileo. Pro la intereso la ekspozicio daŭris ĝis la 10a de junio.
En la aranĝo de tiu jubilea festo partoprenis la Komunuma Komitato pri Kultura Disvolviĝo, kies reprezentanto inaŭguris la Semajnon, la filatelista urba asocio kaj la Esperantista Societo „Lumo".
Speciale pri la jubileo estis eldonitaj du afiŝoj, kovertoj kun la emblemoj de la jubileo, funkciis poŝta stampo „Komenco de Organizita Esperanto Movado 5000 V. Tarnovo 1888 — 1988".

Olga Cankova

XI-a Ĉebalta Esperantista Printempo

Tiu internacia tradicia aranĝo okazis inter 88-05-30/06-05 en la urbo Koszalin. En ĝi partoprenis 60 personoj el ok landoj. La programeroj estis ampleksaj, sed tamen restis sufiĉe da tempo por la ĈEP-anoj ripozi, butikumi kaj eĉ aranĝi proprajn programerojn, ekz. ekskursojn al la plej proksimaj vidindajoj de la urbo kaj ties ĉirkaŭaĵo.
La plej gravaj eventoj estis la inaŭguroj de la strato „Esperanto" en Mielno kaj de la strato „Zamenhof" en Koszalin, la celebrado de la 10-a datreveno de la plantado de la „kverko de paco" kaj la renkontiĝo kun la urbestro. Dum la vesperoj ni povis ĝui kulturajn programerojn de muziko kaj kantado, aŭdis interesaĵojn pri „Monda Turismo", „Esperantotur'", la projekto Bialistoko k. s. Berlina esperantisto prezentis sian urbon pere de belaj diapozitivoj, okazis medicina prelego.

Ronald Schindler

Eldonejo ILTIS 20-jara

Saarbrücken. — En printempo ĉi-jara la eldonejo Artur Iltis povis retrorigardi al 20-jara historio. Fondita en 1968, ĝi lanĉis kiel unuan eldonaĵon la satiran libreton de Kanguruo, **Kiel (mal)venkigi Esperanton?** kiu tuj garantiis al ĝi la atenton de la publiko.
La ĉefa celo tiama, tamen, estis rehavigi elĉerpitajn lingvistikajn kaj literaturajn verketojn, kiel atestas la titoloj de la unuaj jaroj: **Unua Libro** de Zamenhof kaj ties **Granda Vortaro D-Eo,** la **Verhältniswörter** de Wüster kaj du vort-faraj studoj de Saussure. En 1970 sekvis **Mondo kaj koro** (Kalocsay), en 1973 faksimilo de la fama Zamenhofa **Letero al Emile Javal.**
Post plur-jara paŭzo Iltis reprenis sian agadon en 1977 en la kadro de Sarlanda Esperanto-Ligo. De tiam vastiĝis la programo kiu nun ampleksas (inter 1983—1987 kiel Jubilea Eldon-serio) kvin libro-seriojn: originala beletro, tradukita beletro, esperantologio, interlingvistiko kaj scienco. Jen kelkaj aŭtoroj kies verkoj aperis sub la ŝildo de Iltis: Adamson, Albault, Auld, Becker, Bein, Bernard, Boulton, Conterno, Cseh, Diego, Drezen, Grabowski, Haupenthal, de Hoog, Kalocsay, Lippmann, Manders, Minor, Neergaard, Newell, Pić, Plehn, Ragnarsson, Ribillard, Saussure, Szilágyi, Schenkel, Schmidt, Schwartz, Stuttard, Urbanová, Varankin, Vatré, Wingen kaj Zamenhof.
Al la kontribuoj por la Jubilea Jaro apartenis i.a. la represo de la monumenta romano **Kiel akvo de l'rivero,** la germana versio de **Lingvistikaj aspektoj** (Wells/Becker), kaj la lanĉo de plia Pić-romano, **Klaĉejo.** Ĉi-lasta aŭtoro, nun diskutata ĉe ĉiuj anguloj de Esperantujo, lanĉiĝis ĉe Iltis. Al la iniciatoj de la Iltisa Skolo apartenas ankaŭ la **Literatura Manifesto '87,** kies tekston pluraj Esperanto-gazetoj rifuzas publikigi.
Espereble la frukto-dona agado de Iltis kaj ties kontribuo al la Esperanta kulturo daŭros ankaŭ en la estonteco.

Günther Becker

Dum tradukologia konferenco pri planlingvoj

Dum la 17-a ĝis 19-a de majo 1988 Humboldt-Universitato de Berlin (GDR) organizis internacian konferencon pri la kadra temo „Tradukologio kaj edukado de tradukistoj". Oni prezentis pli ol 100 prelegojn. Inter ili ankaŭ aperis la temo de planlingvoj.

D-ro sc. Sergej Kuznecov, Instituto pri Lingvoscienco ĉe la Akademio de Sciencoj de USSR prezentis la anglalingvan prelegon „Planlingvo kaj tradukologia teorio". Sekvis lian prelegon germanlingva kontribuo de doc. d-ro sc. Detlev Blanke „Planlingvoj kaj tradukado — ĉe la ekzemplo de Esperanto". Ambaŭ prelegoj elvokis viglan intereson kaj diskuton. La resumoj de ambaŭ prelegoj troviĝis en la kongresmaterialo. La tekstoj eventuale aperos en volumo pri la konferenco.

Prelego de Blanke en Praha

La 22-an de aprilo 1988 d-ro Detlev Blanke prelegis en Praha pri la temo „Scienca valoro de planlingvoj" en germana lingvo. Invitis la Lingvistika Societo ĉe la Ĉeha Scienca Akademio kaj la Literatura Sekcio de Ĉeha Esperanto-Asocio.

„La mondo, paco kaj fantazio"

La rusa vorto „mir" havas du signifojn: la mondo kaj paco. Tial estis malfacile per unu vorto traduki ĝin en la titolo „Mir i fantazia", kiun havos konstanta internacia ekspozicio de infan-verkoj en la Pionir-Palaco de la granda industria urbo Ĉelabinsk, USSR.

Iniciatintoj de la ekspozicio estas geknaboj el la klubo „Scipovaj manoj". Ili pretas reciproke interŝanĝi infan-laborajojn kun ĉiu klubo tutmonde, proponante pupojn, ludilojn, kudrajojn, trikajojn, brod-, skulpt-, desegn-, plektajojn . . . La ekspozicio bezonas la samon kaj, se eble, ceramikajojn, tapiŝetojn, gobelenojn ktp.

Jen la adreso: USSR 454000 Ĉelabinsk, Dvorec pionerov, Ankudinova T.

E-klubo de tiu Pionir-Palaco pretas helpi traduke.

La iniciatintoj petas: esperantistoj, aperigu jenan anoncon en porinfanaj kaj pedagogiaj periodajoj nacilingve!

E-klubo „Stelo de l'Espero"

Praga 88

PRAGA '88, tio estas la nomo de la Tutmonda ekspozicio de poŝtmarkoj, kiu okazis en la ĉeĥoslovaka ĉefurbo Praha, dum la tagoj 26. 8. — 4. 9. 1988 sub aŭspico de FIP — Universala filatelia federacio.

En la ekspozicio PRAGA 88 oni povis ankaŭ vidi la plej bonajn Esperanto-filatelajn eksponaĵojn de la mondo, kiuj ĝis nun gajnis ĉe diversaj filatelaj ekspozicioj aron da medaloj kaj premioj.

La ĉeĥoslovaka federacia ministerio de telekomunikoj kaj trafiko okaze de PRAGA 88 aperigis porokazan poŝtmarkon kun esperantlingva teksto. Enkadre de PRAGA 88 internacie renkontiĝis ankaŭ Esperanto-filatelistoj.

Vladislav Hasala

Esperanto-prospektoj el ČSSR

La ĉeĥoslovaka vojaĝoficejo ČEDOK aperigis deksespaĝan, kolore ilustritan, esperantlingvan prospekton: „CEDOK prezentas al Vi Ĉeĥoslovakion", kiun eblas senpage ricevi je la adreso: ČEDOK, Esperanto-fako, Na příkopě 18, CS-111 35 Praha 1, Ĉeĥoslovakio.

La entrepreno BALNEA, kiu reprezentas ĉeĥoslovakajn ŝtatajn banlokojn kaj termobanejojn ankaŭ aperigis esperantlingvan, kolore ilustritan prospekton: „Ĉeĥoslovakaj termobanejoj por Via sano", kiun eblas senpage ricevi je la adreso:

BALNEA, Esperanto-fako, Pařížská 11, CS-11001 Praha 1, Ĉeĥoslovakio. Tiu ĉi entrepreno BALNEA ankaŭ aperigis esperantlingvan kolorbildkarton: „Ĉeĥoslovakaj ŝtataj banlokoj". Skribu amase al tiuj menciitaj adresoj.

Vladislav Hasala

Senpage prospekto el GDR

La Agrikultura Ekspozicio de GDR („agra") nun eldonis la prospekton „Naturprotektado en Germana Demokratia Respubliko", kiu estas multkolora kaj multpaĝa. Mendu la senpagan prospekton ĉe: Landwirtschaftsausstellung der DDR, agra-buch, Raschwitzer Straße 11/13, Markkleeberg, DDR—7113!

Libro pri Zamenhof

La konata vjetnama verkisto kaj esperantisto Nguyen Hai Trung verkis libron pri L. L. Zamenhof kun la esperantigita titolo „Por ni tiu ĉi homo vivis". Ĝi aperis 1987 en la serio „Biblioteko Popola" en Ho-Chi-Min-Urbo kun amplekso de 123 paĝoj.

Letervespero en la danuba urbo

Letervesperon aranĝos la 7. 11. 1988 nia urba esperanto-grupo, kaj atendas salutleterojn kaj aliajn el la tuta mondo. Respondo estas garantiata!

Progreso Esperanto-Grupo, Dunaujváros, Pf. 139, H 2401, Hungario.

Korekto

En „der esperantist" 1/88 aperis de Bernard Golden la artikolo „Kiel kompili kaj publikigi fakterminarojn?" La sekvaj frazeroj estas ĝustigendaj sur p. 21 en la unua kolumno: linio 5/6: Post la vortoj „Post peto de helpo" devas sekvi „per sendado de fakliteraturo kaj terminoj kun difinoj, venas la". Tiam sekvas sur linio 6 „plej grava demando . . ." linio 8: „cirkulero opinioj" devas esti „cirkulero pri opinioj".

El la vivo de GDREA

Arta Semajno en Halle

Inter la 8-a kaj la 13-a de majo 1988 sub la nomo „Arta Semajno '88" okazis en Halle artisma renkontiĝo de gejunuloj el socialismaj landoj. La organizinto de la aranĝo, en la nomo de la Distrikta Estraro de GDREA en Halle, Hans-Peter Bartos, samtempe membro de la Centra Estraro, sukcesis kunvenigi ĉirkaŭ 80 esperantistojn el Bulgario, Ĉehoslovakio, GDR, Hungario, Pollando kaj Sovetunio (Latvio kaj Litovio). La programo konsistis ĉefe el komunaj laŭgrupaj laboradoj sub la devizo „Ni kreu kune!". Por ekzemplo: kantemuloj, da kiuj estis eble plej multaj, elektis aŭ koruson, aŭ kabareton, kvankam escepte de dekkelkaj bulgaraj knabinoj [kiuj jam formis memstaran, naci-karakteran kant-ensemblon „Verda Stelo"]. Fotemuloj vagadis tra la urbo por specife kapti la ĉiam eskapantan nunon, por konservi ĝin pli bela, kelkfoje eĉ mistifika (per trukfotoj). Aliaj, laŭ siaj kapabloj, povis ankoraŭ aliĝi al laborgrupo pri plastika arto, eventuale al tiu pri literaturo. Ĉiuj kune ĝuis ankaŭ riĉan kulturprogramon. Ĉi-koncerne menciindas tuttaga ekskurso al Schönburg kun ĉampangustumado en la tiea fortikaĵo, peraŭtobusa urbogvidado kun vizito al la muzeo Händelhaus, tra kiu la partoprenintojn gvidis esperantlingva magnetofon bendo; la muzikalo „Lola Blau" de Georg Kreisler, diskutforŭmo por la paco, en kiu elpaŝis inter alie reprezentanto de Libera Germana Junularo. La lasta montriĝis sensukcesa, ĉu pro manko de la emo diskuti, ĉu pro manko de pli konkretaj, tiklaj demandoj respondendaj komune.

Krome okazis kelkaj diskotekoj, gvidataj de gastensembloj, modparado, tute spontanaj kunkantadoj ktp. Sed ĉiuj preparis sin por la kulmino de la aranĝo: por la vendreda prezentado de la plej bonaj rezultoj. El la ekstermovadaj invititoj alvenis neniu ajn, sed por la kompenso, la post-sekvan sabatan prezentadon destinitan principe al loka loĝantaro gapis almenaŭ kelkaj preterpasintoj . . . Jen, malgraŭ pluraj artikoloj pri la Arta Semajno aperintaj en lokaj kaj tutlandaj gazetoj, kiujn verkis kaj dissendis la organizinto mem, la interesiĝo de la enloĝantoj pri la aranĝo montriĝis preskaŭ nula.

Ankaŭ sabate, sed jam matene, pli frue ol planite, ĉiuj akuratuloj estis surprize premiitaj per video-registraĵo pri la antaŭtaga prezentado. Tiuj, kiuj la spektadon maltrafis, havos la ŝancon rigardi la filmon oktobre en la I-a Junulara Esperanto-Renkontiĝo de GDREA (de la 3-a ĝis la 6-a).

La aliĝkotizoj de ĉirkaŭ 300 markoj efektive estis iom tro altaj por tiuj ĝenerale idealistaj gejunuloj, tamen ili pli malpli valoris la varian kaj riĉan programon. Cetere preskaŭ ĉiuj el la partoprenantoj ĝuis krome interpersonajn kontaktojn, el kiuj sekvis interŝanĝoj de pensoj, ideoj kaj spertoj, interkonatiĝoj, interamikiĝoj, eĉ enamiĝoj, ĉi-ĉion — principe senkoste.

Sławomir Ruszkiewicz (Pollando)

Junuloj pentekoste

Ĉi-jare pentekoste (22./23. 5. 88) 24 gejunuloj renkontiĝis en bela laga regiono kaj tendumis en Dargun (distrikto Neubrandenburg).

Saksa Esperanto-lernejo

La Distrikta Estraro Leipzig de GDREA fondis konstantan kvalifikejon sub la nomo „Saksa Esperanto-lernejo". Ĝi ekfunkcios ekde 1. 9. 1988 kaj servos al ĉiuj esperantistoj de la distriktoj Leipzig, Karl-Marx-Stadt kaj Dresden. SEL organizas kvalifikajn Esperanto-kursojn dum semajnfinoj. Oni havos unujarajn kaj dujarajn kursojn. Tio signifas jare 7 semajnfinojn. SEL ankaŭ organizas ekzamenojn laŭ la ŝtata nivelo de G (Grundstufe; elementa nivelo) kaj „SPK 1" (Sprachkundigenprüfung 1, supera nivelo 1).

Interesatoj skribu al Esperanto-Verband im Kulturbund der DDR, Bezirksvorstand Leipzig, Käthe-Kollwitz-Straße 115, Leipzig, 7010

Lingva ekzameno ĉe GDREA

La unuan fojon la Centra Estraro de GDREA okazigis oficialan lingvan ekzamenon laŭ la „ŝtupo I". Ĝi okazis la 9-an de julio 1988 en Berlin en la ĉefsekretariejo de GDREA. Partoprenis 16 kandidatoj. La postuloj de la **„Lingva ekzameno Esperanto 1"** estas severe adaptitaj al la ŝtata „Sprachkundigenprüfung I". Tio signifas, ke ĉiu kandidato devis trairi 5 ŝtupojn: 1. parola ekzameno, 2. aŭskultado kun kompreno (aŭskulto de teksto de sonbendo kaj skriba resuma reprodukto de la enhavo), 3. skriba tasko (a) verkado de letero kaj resumo pri prelego aŭ b) aliĝo al internacia kurso por aktivulo kun detala sinprezento), 4. traduko de Esperanto-teksto, 5. legado kun kompreno (= resuma germanlingva prezento de la enhavo de iom ampleksa Esperanta teksto).

Partoprenis 16 kandidatoj. Oni disdonis la predikaton „tre bone" (1) 8 x, „bone" (2) 4 x, „kontentige" (3) 4 x. Ĉiuj kandidatoj sukcesis. Jen la listo de la sukcesintoj:

Lingva ekzameno Esperanto I (listo 1)
Margit Armitter, Torsten Bendias, Manfred Goldenbogen, Renate Jungnickel, Egon Karwoth, Friedrich Krake, Christel Kraus, Erhard Kraus, Wolf Krüger, Bernd Kuse, Carola Lehr, Lothar Müller, Barbara Schroth, Dr. Wolfgang Schwarz, Uwe Siebert, André Weber.

Ekzemplodona

La popularscienca revuo „Fokuso" vere estas tiom altvalora, ke indas proponi ĝin al bibliotekoj por abonado. Inter la unuaj GDR-bibliotekoj, kiuj jam abonas „Fokuso"-n, troviĝas la biblioteko de la Minista Akademio Freiberg.

El la vivo de GDREA

OFICIALA KOMUNIKO
de la Distrikta Estraro Leipzig de GDREA

La Distrikta Estraro Leipzig de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR vin invitas partopreni en nova internacia esperantista aranĝo, kiu nomiĝas

„armeza Esperantista Semajnfino"
(mallonge: JES)

kaj okazos de la 23-a ĝis la 25-a de junio 1989 en la urbeto Markkleeberg, kiu kvazaŭ estas urboparto de Leipzig. Ĉiujn preparojn de tiu ĉi aranĝo faras la sama teamo, kiu de multaj jaroj sukcese okazigas la famkonatan aranĝon „IFER" (Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo).

La „JES"-Organiza Komitato

invitas ĉiujn esperantistojn de la mondo al partopreno en tiu aranĝo, kiun ni unufoje okazigos en kunlaboro kun la Agrikultura Ekspozicio de GDR (cetere la plej granda tiaspeca!),

elektis kiel ĉefan temon

Panon por ĉiuj havas la tero,

gastigos ĉirkaŭ 250 esperantistojn el multaj landoj de la mondo, ekpetas jam nun proponojn de fakuloj pri prelegoj ktp. kiuj rilatu al la menciita ĉeftemo.

Jen pliaj informoj:

* La „JES"-aranĝo ne nur turniĝas al ekspertoj pri agrikulturo, sed al ĉiuj esperantistoj, kiuj intencas uzi la internacianlingvon kiel interkomprenilo. Tamen: interesiĝantoj pri naturprotektado, forstado, naturo en tre vasta seuco, bestobredado, etĝardenado kaj similaj telmoj havos okazon pliprofundigi tiurilatajn konojn.
* La aranĝo ankaŭ taŭgos por komencantoj de la lingvo Esperanto.
* „JES" okazos sur la areo de la Agrikultura Ekspozicio de GDR en Leipzig-Markkleeberg, do meze de verda naturo! La programaro de tiu Ekspozicio estas ege abunda kaj alloga — vere por ĉies gusto!
* En aŭtuno de la jaro 1988 ni aperigos senkostan ampleksan bultenon, kiu enhavos ĉiujn detalojn de la „JES"-aranĝo. Jam nun oni povas antaŭmendi ĝin ĉe:
  KULTURBUND DER DDR, Esperanto-Asocio,
  Käthe-Kollwitz-Straße 115, Leipzig,
  DDR-7010.

Jam nun notu:

* La Distrikta Estraro Leipzig de GDREA okazigos de la . . . ĝis la . . . de marto 1990 denove la allogan aranĝon „Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo" (IFER). Verŝajne la ĉeftemo pritraktos la fakton, ke Leipzig en 1989 fariĝos 825-jara.

Kolora prospekto pri Potsdam-Sanssouci

Jus aperis tre belkolora bone tradukita prospekto pri la kasteloj kaj ĝardenoj de Potsdam-Sanssouci. La 24-paĝa broŝuro entenas 20 bonkvalitajn fotojn kaj detalan mapon pri la parko. La broŝuro kostas 1 markon kaj estas havebla ĉe GDREA nur en unuopaj ekzempleroj. Pli grandajn kvantojn la grupoj kaj distriktoj mendu rekte ĉe: Generaldirektion der Staatlichen Schlösser und Gärten Potsdam Sanssouci, Potsdam 1571. La broŝuro estas tre plaĉa donaco por eksterlandaj amikoj, ĉe kiuj eble ekestos la deziro konatiĝi kun la famaj kasteloj.

Pri Richard Schulz el Potsdam

Antaŭ iom da tempo pluraj jarkolektoj de diversaj Esperanto-gazetoj kaj aliaj interesaj esperantistajoj atingis la oficejon de la Esperanto-Asocio en Berlin.

Senditoj estis la geedzoj Kadenbach el Potsdam. S-ino Kadenbach, la filino de la iama aktiva esperantisto, Richard Schulz, decidis kun sia edzo transdoni parton de la zorgeme konservita Esperanto-heredaĵo al GDREA. Ankoraŭ ili ne havas sufiĉe da tempo kaj emon okupiĝi pri Esperanto. Sed restis post la morto de Richard Schulz kelkaj kontaktoj kun iamaj korespondantoj de ŝia patro kaj granda simpatio por Esperanto.

Kiu estis Richard Schulz?

La pli aĝaj esperantistoj el Potsdam certe rememoras pri li, ĉar dank' al pluraj lingvokursoj, kiujn li gvidis, kelkiu fariĝis esperantisto aŭ restis amiko de nia movado.

Naskita la 25an de junio 1899 en laborista familio, Richard Schulz lernoservis ĉe fajnmekanikista majstro kaj kelkjare laboris kiel ilfaristo. Junaĝe li fariĝis membro de la sindikato, de kulturaj kaj aliaj laboristaj organizaĵoj kaj ekde 1919 li membriĝis al Komunista Partio de Germanio.

25 jaraĝa Richard Schulz sukcesis en abiturienta ekzameno, poste li finis studadon kiel „popolekonomikisto". Lia daŭra emo sin kvalifiki estis karakteriza.

1924 komenciĝis la okupiĝo pri Esperanto-same daŭra emo. Post unujara lernado sekvis instruado de Esperanto. Li gvidis kurson en Nowawes (nun Babelsberg, parto de Potsdam). Ĉiuj grupanoj membriĝis al Germana Laborista Esperanto-Asocio. La grupo mem rapide kreskis kaj estiĝis rimarkinde multnombra. 1933, antaŭ la potencakiro de la faŝistoj, al la grupo apartenis pli ol 80 aktivaj esperantistoj kaj 21-kapa infangrupo.

Dum la faŝisma reĝimo li kaj aliaj esperantistoj uzis la internacian lingvon kaj restintajn kontaktojn por kontraŭagi la militarisman Hitleran politikon.

Post la II-a Mondmilito Richard Schulz daŭrigis novimpete sian E-okupon. Enkadre de Kulturligo li denove instruis Esperanton, parte en la vespera lernejo. Kun multaj ideoj li helpis plialtigi la lingvan nivelon dum la grupaj renkontiĝoj.

Li forpasis la 23-an de junio 1979

Ingrid Mewes

Amikeco inter Schwerin — Piła

Fine de aprilo 1988 malgranda delegacio de la distrikta Esperanto-Asocio Schwerin veturis al la pola ĝemelurbo Piła, kie la prezidanto

Kurt Güse subskribis kontrakton pri amikeco kaj kunlaboro inter la E-grupoj de la vojevodio Piła kaj la distrikto Schwerin. Oficialaj kaj privataj kontaktoj ekzistas jam ekde kelkaj jaroj.
La ŝverinaj gastoj estis korege akceptitaj en la rondo de la polaj gesamideanoj. En Piła ili travivis neforgeseblajn horojn en amika etoso, kun vigla babilado kaj reciproka simpatio.

Elli Güse

Porinfana Faklibro pri Film-Arto

Donĉo Ĥitrov: En la mirinda mondo de la kino HEA, Budapest 1985, 212 p., formato 18,5 x 22, broŝ.

Kiu inter ni ne interesiĝas pri kino, pri filmarto, pri la mirakloj sur — kaj malantaŭ la ekrano?
La aŭtoro, granda kino-ŝatanto ekde sia infaneco kaj dum multaj jaroj profesia filmisto, estas iniciatinto kaj prezidanto de ILEF (Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-Kino-Magnetofon-Amatoroj).
En „la mirinda mondo" li kombinas aventurecan rakonton kun enkonduka faklibro. Per „mi-rakonto" de 12-jara knabo li kreas por la leganto la emociigan travivajon de filmaktorado, de la unuaj fotoj kaj provludoj ĝis la premiera aplaŭdo.
Velizar, lernanto en la 6-a klaso, rakontas al sia pli aĝa amiko (la aŭtoro) kiel li estis elektita por ĉefrolo en „La aŭdacaj plumoj", porinfana krimfilmo, kaj pri siaj aventuroj dum ties realigo. Tiel la leganto alterne informiĝas pri la ekscita intrigo kaj la miriga maniero, laŭ kiu „scenaro" transformiĝas en projekcieblan filmon. Per la okuloj de la knabo ni vidas dekoraciojn kaj lumĵetilojn en la granda „filmad-pavilono" kaj veturantan son-registrejon por subĉiela filmado, ni spertas la „magion de la ŝminkado" kaj la sorĉadon de la truk-specialistoj. Kun li ni ankaŭ travivas la strangan situacion, vidi sin mem unuan fojon sur ekrano.
Foje la aŭtoro interrompas la rakonton de sia heroo por prezenti al ni la kunlaborantojn de la filma skipo kun siaj diversaj specialecoj aŭ li donas tutan „Lecionon pri historio de la kino", kiu komenciĝas per pentritaj homaj figuroj sur la kolonoj en faraonaj temploj kaj provizore finiĝas ĉe video-filmoj.
Kun Velizar kaj liaj amikoj ni vizitas la „universalan magazenon", kie oni konservas vestojn kaj objektojn el diversaj historiaj epokoj, kaj la piroteknikistojn, kiuj estas veraj „majstroj de fajro, fulmoj kaj nebuloj".
Kiam dum laboraj paŭzoj oni distras la infanojn per projekciado de pentritaj kaj puraj filmetoj, ni konatiĝas kun la „arto de animado" kaj diversnaciaj skoloj de animataj filmoj (aŭ trukfilmoj).
Avantaĝo de tiu rakont-metodo estas, ke unue la knabo povas detale priskribi ĉiujn por li novajn fenomenojn, kaj poste li informas pri la nomoj, kiujn donas la plenkreskuloj (do: la fakuloj) al ili. Tiel la leganto unue ricevas kvazaŭ difinon kaj poste la terminon de iu faka nocio.
Speciale valorigas la verketon ĝia „II-a parto" (kvankam nur dekono de la tuto). En tiu „konciza filma terminaro" la aŭtoro alfabete listigas kaj klarigas la fakajn vortojn aperintajn en la teksto. Tamen ĝuste tiu glosaro ankaŭ malkovras la malfortan flankon de la merita entrepreno: la aŭtoro ja estas profunde sperta fakulo kaj li (preskaŭ perfekte) majstras la „skatoligan" stilon de sia rakonto — sed li ne sisteme evoluigis sian vortmaterialon. Tiel okazas, ke foje unu vorto havas 3 signifojn:
„kadro" =
1) kombinita bildo, projekciita sur la ekranon
2) ununura rektangulo („ĉelo") de la film-bendo (24/36 mm)
3) parto de sceno, filmita seninterrompe

Aliflanke koincidigi bildojn kaj sonojn jen estas „sinkronigi", jen „sinkronizi".
Same la aŭtoro ne decidis, ĉu kunigi ĉiujn sonojn (voĉojn, bruojn kaj muzikon) sur la filmbendo estu „munti" aŭ „miksi". Tiel la agon li nomas „miksado", la rezulton de la ago „muntaĝo", la agantan homon „muntaĝisto" kaj la aparaton jen „mikstabulo", jen „miksŝalttabulo". Do, iom facilanime Ĥitrov lezas la terminologian principon de „unu-senceco".
La libreto estas riĉe ilustrita per instruaj fotoj (bedaŭrinde malbone reproduktitaj) kaj amuzaj desegnajoj. Preseraroj malmultas, sed ĝenas miskribo de kelkaj famaj nomoj kiel „Lawrell kaj Hardy, Harrold Lloyd, Buster Keaton" k. a. (Ĉu efiko de retraduko el la bulgara kiril-skribo?).
Tamen tiuj makuletoj ne malaltigas la valoron de la verketo, kiu estas unika en Esperantujo. La menciitaj malkonsekvencajoj en la terminaro eĉ povas instigi la diskuton, pri kiu la aŭtoro eksplicite petas.
Kvankam ĉefe destinita por „junaj legantoj", la libro certe trovos intereson ankaŭ ĉe plenkreskuloj, kiuj deziras aferecajn informojn pri la temo kaj ĉe fakuloj, kiuj interesiĝas pri esperantigo de la plej kutimaj terminoj.

Wera Blanke

Ni kore gratulas al

— Erich Ehmig el Hildburghausen, iama membro de LEA, aktiva esperantisto kaj internaciisto, kiu fariĝis 80-jara la 13-an de aŭgusto 1988.
— la meritplena hungara esperantista aganto, fervojisto, d-ro István Bácskai, honora prezidanto de HEA, kiu fariĝis 80-jara la 10-an de februaro 1988.
— Paul Linke, prezidanto de la Distrikta Estraro de GDREA en Rostock, pro lia 50-a naskiĝtago, 29. 7. 1988
— Siegfried Linke en Halle, membro de la prezidio de GDREA, pro lia 50-a naskiĝtago, 24. 7. 1988
— d-ro Detlev Blanke, kiu ricevis okaze de lia 20-jara laboro en Kulturligo la Johannes-R.-Becher-medalon en oro.

Ni funebras

— pro la forpaso de la iama membro de LEA, la longjara aktivulo de GDREA, Kurt Heeg el Fraureuth, kiu mortis dum majo 1988.

La Suplemento al PIV-grava sed ne sufiĉa

PIVS — Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, Suplemento, SAT, Paris, 1987, 45 paĝoj.

1. Pritakso ĝenerala

Konsiderante la fakton, ke kompareblaj nacilingvaj verkoj, ekzemple la germana Duden, aperas en vesto de nova versio ĉiam post ĉirkaŭ kvin jaroj, mi devas konstati, ke PIVS (kompare al PIV el 1970 kun 1300 paĝoj) aperas ne kiel nova versio, sed kiel suplemento, aperas ne post kvin sed post deksep jaroj, estas ne ampleksa, sed nur 45-paĝa.

Tio estas kvazaŭ mezurilo de la fortoj troveblaj en la Esperanto-movado, kaj samtempe tio montras la grandiozan laboron plenumitan ĝis 1970 fare de prof. Waringhien kaj liaj kunlaborintoj. Tamen tiu verketo helpos dum la plua disvolviĝo de Esperanto al lingvo servenda ankaŭ al la apliko en sciencoj kaj teknikoj. Bedaŭrinde la nomitaj faktoj montras, ke la sciencoj kaj teknikoj pli rapide evoluas ol la ĉi-rilata vortprovizo en Esperanto.

Laŭ la antaŭparolo, la verketo havas la jenajn taskojn:

— akordigi PIV kun la decidoj de la Akademio de Esperanto,
— korekti trovitajn enhavajn erarojn de PIV,
— aldoni praktike jam uzatajn neologismojn,
— reĝustigi kaj aldoni geografiajn nomojn,
— transpreni gravajn terminojn el intertempe aperintaj diversaj vortaroj,
— proponi diversajn terminojn kaj termino-variantojn el la fako komputado, kiu preskaŭ tute ne estis reprezentita en PIV.

„Tiu ĉi suplemento dispartiĝas preskaŭ egale inter novaj terminoj kaj aldonoj, modifoj, korektoj ĉe jam ekzistantaj artikoloj."

La leganto permesu, ke mi speciale traktu du fenomenojn de la verketo: la neologismojn, kaj la terminojn el la fako komputado.

2. Kelkaj neologismoj el PIVS

„aides/o MED (A.I.D.S.) akronimo por ‚akirita imuno-deficita sindromo': nova malsano, ŝuldata al . . ."

„gemut/a. POET Hejmeca, agrableto sa".

„hipi/o. Ano de movado batalanta kontraŭ la socion de konsumado kaj celanta al la plena libereco de vestoj, kutimoj kaj socialaj rilatoj".

„supernova/o. ASTR Giganta steleksplodo, . . ."

Tiuj malmultaj ekzemploj montru, ke la aŭtoroj — miaopinie — tro forte tendencas al naturalisma termino-formado. Ĉu ne ekzistas ĝeneralaj rekomendoj por la formo de neologismoj? Mi proponas postuli, ke neologismo nek enhavu afikson kiel parton de la radiko („**ge**muta"), nek estu akronimo de longa **angla** termino (aideso). La naturalisma tendenco devigas nin ekzakte difini nian starpunkton pri la rolo de la angla lingvo en nia termino-elekto kaj -formado.

3. Terminoj de la fako „komputado"

Preskaŭ ĉiu esperantisto minimume aŭdis pri la fakto, ke la fakuloj ĉiam denove disputas, ĉu „komputilo" aŭ „komputoro" estu la ĝusta termino. Simile kelkaj aliaj sinonimoj konkursas. Unuavide oni povus supozi, ke PIVS nun metas findecidan punkton sub la disputoj. Sed la aŭtoroj, ĉepinte la s-roj Levreaud kaj Waringhien, estis pli saĝaj kaj ne faris tion. Ili ofertas amaseton da sinonimaj „variantoj" (prezentitaj per VAR), kiuj ne signifas, ke ili estus evitindaj, ĉar la indik-signo „(evi)" krome ekzistas kaj estas aplikata kaze de neceso. Tre saĝe la aŭtoroj emfazas: „Ni tamen esperu, ke dum la kompilado de nova P.I.V., la uzado estos decidinta inter tiaj variantoj". Kontraŭe, mi konstatis, ke la aŭtoroj eĉ en la difinoj ne ĉiam referencas al la graslitere proponitaj terminoj, sed kelkfoje al la „varianto", ekzemple en:

storo: aranĝaĵo, kiu kapablas reteni informojn por posta retrovo. Var.: memoro, memorilo.

romo: daŭra, ne modifebla **memoro.** Var.: nur legebla **memoro.**

Vole-nevole PIVS atentigis pri la problemo, kiom-precizia estu iu termino. Mi montros la demandon ĉe la dilemo pri komputi/komputori. PIVS ĝuste eliras el la fakto, ke ni en Esperanto bezonas bazan terminon por **en** data processing, information processing, **fr** traitement des données, **de** Datenverarbeitung.

Kaj PIVS nun proponas por tio: **komputado.** Feliĉe ili faris tiel, ĉar tiun terminon akceptas la plejmulto de la fakuloj, kaj ĝi simple signifas la agadon „produkti datumojn el aliaj datumoj", sen indiko pri la grado de automateco. (Bedaŭrinde en PIVS oni tion difinis nur per vicigo de subordigitaj terminoj). El **komputado** oni bonege povas formi: komputilo, komputanto, komputiko, komputikisto. Sed nun la autoroj de PIVS (iom tro unuflanke orientitaj laŭ la indikoj de R. Eichholz) enkondukas pluan novan terminon, kaj bedaŭrinde ili faras tion ne per la komparebla formo „komputorado", sed per „komputoro". Tamen la senco estas la jena:

komputorado: la agado, elektronike, aŭtomate kaj laŭalgoritme produkti datumojn el aliaj datumoj.

Estas ege interesa fakto, ke R. Eichholz en la „perkomputora termino-kolekto" (PekoTeko) por „komputado" notis la supre nomitajn etnolingvajn ekvivalentojn, sed por „komputori/komputorado" li **ne trovis** nacilingvajn ekvivalentojn. Alivorte, la etnolingvoj ne bezonas la diferencigon (per speciala termino) interaŭtomata kaj ne-aŭtomata komputado, kaj kaze de bezono ili antaŭmetas la respektivan adjektivon por „aŭtomata".

Krome, en la praktika vivo, la ne-aŭtomataj komputad-aparatoj tute perdas sian signifon, car la modernaj preskaŭ ĉiam estas elektronikaj, aŭtomataj kaj laŭalgoritmaj. Konklude mi konstatas, ke nek enhave, nek lingve necesas tia diferencigo. Sekve mi proponas, simple forstreki la radikon **komputor-**, ĉar ne bezonata. Se ni celas emfazi iun aspekton de speciala komputado, ni aldonu la respektivan adjektivon.

4. Resumo

La enhavo de PIVS ŝovas nin prave en la direkton, pli kaj pli science okupiĝi pri terminologio, kaj ĝi estas bona paŝo sur la vojo al nova PIV. Sed mi ege esperas, ke ĝi ne estos preteksto por longe prokrasti la ellaboradon de la nova versio de PIV.

Michael Behr

Belka Beleva: Teatro sen lingva bariero
Bulgara Esperantista Asocio, Sofio 1986, 127 p., A5

Belka Beleva, la plej konata, plej sperta, plej fidela aktorino de la Esperanto-teatro, retrorigardas al la unua kvaronjarcento de sia kultura agado per kaj por la internacia lingvo. Ŝi kaj ŝia edzo, Anani Anev, ja estas la „dojenoj de la Esperanto-scenejo" (p. 48). Trafoliumante sian arkivon de recenzoj la aŭtorino faras la leganton atestanto de senfina vico de laŭdoj, aplaŭdoj kaj brilaj sukcesoj, kiujn malavare konfirmas la esperanta gazetaro.

Rigardante sian hejman „altaron" ŝi konatigas kun la kolektitaj vojaĝ-memorajoj kaj rakontas pri kortuŝaj travivaĵoj ligitaj al scenejaj prezentadoj — de antikve grekaj amfiteatroj ĝis islandaj gejziroj, de la giganto Shakespeare kaj lia naskiĝdomo en Stratford on Avon ĝis la liliputa urbeto Madurodam en Nederlando.

La evidente abundan materialon Beleva klopodas prezenti koncize, la ampleksan temon ŝi lerte strukturigas en ĉapitrojn. „Laŭvice de la jaroj" resumas la sinsekvon de eventoj, „en Hungario 1966-1984" kaj „IFEF 1968-1984" emfazas la speciale amikajn rilatojn de la aktora paro al hungaroj kaj fervojistoj. „Aranĝoj de BEA" kompreneble okupas apartan lokon.

1958 Anani Anev kaj Belka Beleva debutis sur la Esperanto-scenejo kaj dum la sekvantaj jardekoj „ili ludis en sennombraj spektakloj en ĉ. dudeko da eŭropaj landoj antaŭ dekmilo da esperantistoj (p. 46).

En la ensemblo de BET (Bulgara Esperanto-Teatro, kies kunfondintoj kaj plej elstaraj membroj ili estas), foje en IAT (Internacia Arta Teatro), duope aŭ solaj ili prezentis klasikajn kaj modernajn komediojn, skeĉojn, monologojn kaj kulturajn programojn, kies tekstoju ne malofte ili mem estis tradukintaj. B. B. rakontas pri la laboro kun siaj kolegoj aktoroj, kun reĝisoroj, scenografoj kaj perukistoj. Longan vicon da prezentaĵoj ŝi dokumentas per recenzoj kaj fotoj (el kiuj 17 troviĝas meze de la libro).

Por ĉiu ŝatanto de la Esperanto-teatro la verketo estos agrabla legajo, kiu freŝ-tone kaj emoci-plene informas pri la lumaj flankoj de tiu sindona kaj oferema agado (ja kutime la monatoj da provludaj preparoj estas rekompensataj nur per kelkaj, ofte eĉ nur unu-du prezentadoj).

Sed la libro disponigas valoran materialon ankaŭ por scienca prilaboro de la temo: iam skribota historio de la Esperanto-teatro trovos sufiĉe da informoj pri dramartaj verkoj, enscenigoj kaj instigojn. Bedaŭrinde mankas indeksoj, kiuj povus faciligi tiajn laborojn. La plej ampleksa tia indekso certe estus listo de personoj, plejparte bone konataj en la Movado, kun kiuj konatiĝis kaj amikiĝis BB kaj AA dum siaj gastludoj „sen lingva bariero" dum la pasintaj tri jardekoj.

Wera Blanke

Estona Panoramo. Eld. Perioodika, Tallinn 1986. 142 paĝoj.

Kutime esperantistoj elstaras pro sciemo pri fremdaj landoj kaj vojaĝemo. Konforme granda estas la nombro de libroj kun informa karaktero pri landoj, regionoj, urboj. Ĉi tiu eldonaĵo ne nur laŭ nomo estas „Estona Panoramo". Vere la enhavo prezentas gamon de temoj pri lando, homoj, kulturo kaj politiko de Estonio Nekomplete mi volas listigi kelkajn artikolojn:

— Pensoj pri la XIXa kongreso de Komunista Partio de Estonio
— Pri la agado de estonaj esperantistoj
— Pensante pri la jaro 2000 — la Politeknika Instituto de Tallinn
— Arbaro estas la plej bona monumento por ni mem
— Orkideoj en Estonio
— La mastro de filmoj pri naturo
— La muziko vokas (pri unika muzika salono)
— Nacia en la vestmodo

Ankaŭ multaj personecoj estas prezentataj, inter ili la Esperanto-poetino Hilda Dresen, la grandmajstro de ŝako Paul Keres, la pianisto Kalle Randula, la filmaŭtoro Rein Maran . . .

La libro vere estas riĉe ilustrita. Multaj grandaj, parte koloraj fotoj kaj desegnaĵoj pravigas tiun epiteton. Ke la lingva kaj presa kvalitoj estas bonegaj, tio apenaŭ bezonas emfazon. Do — ek kaj aĉetu!

Michael Lennartz

Werner Plate — honora prezidanto

La Distrikta Estraro Rostock de Kulturligo de GDR distingis la meritplenan esperantiston el Rostock, Werner Plate, per la titolo „Honora Prezidanto de la Distrikta Estraro de GDREA".

Laste aperis

— Vvodnoe slovo v iskusstvo perevoda, N. F. Danovskij. Riga: la aŭtoro, 1985. 132 p. 21 cm. „Enkonduka vorto pri la arto traduki" inter la rusa kaj Esperanto.
— Zamenhof et l' espéranto, Norman Berdichevsky, Jerusalemo: Eldonejo Sivron, 1986. 10 p. 15 cm. Broŝ.
— Zamenhof und Esperanto, Norman Berdichevsky. Jerusalemo: Eldonejo Sivron, 1986. 10 p. 15 cm. Broŝ.
— Zamenhof y el esperanto, Norman Berdichevsky. Jerusalemo: Eldonejo Sivron, 1986. 10 p. 15 cm. Broŝ.
— Antologio de maltaj poetoj, trad. kaj red. Carmel Mallia. Zabbar: la tradukinto, 1985. 168 p. 21 cm. Poemkolekto donanta superrigardon pri la plej elstaraj maltlingvaj poetoj, kun informaj komentarioj de la tradukinto.
— Bagasejo, La (1928), José Américo de Almeida. El la portugala trad. Geraldo Mattos. Chapecó: Fonto, 1985. 176 p. 21 cm. Fonto-Serio n-ro 14. Historie grava romano pri la vivo en la nordoriento de Brazilo.
— Baza legolibro por komencantoj, red. Vilmos Benczik. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1986. 117 p. 20 cm. Kompilajo de 36 mallongaj legajoj verkitaj surbaze de la oftecgrupoj de la Baza Radikaro Oficiala, kun kvinlingva vortareto pri ĉiuj radikoj (en angla, germana, hungara, pola kaj rusa).
— Beethoven: La Testamento, trad. Walter Klag. Vieno: la tradukinto, 1986. 4 p. 21 cm. En koverto, 23 cm. Kun klarigoj kaj gvidfolio al viena Beethoven-ekspozicio.
— Bosniaj elegioj, de Ranko Risojević (1943). El la serbokroata trad. Vesna Skaljer-Race. Banja Luka: Komununa organizo de Esperanto-junularo, 1986. 48 p. 22 cm. Ilus. Omer Berber. Modernstila poemaro inspirita de la historio kaj kulturo de Bosnio.
— Botel-diableto, La, Robert Louis Stevenson. Trad. Ergoto de Bonaero. Buenos Aires: Argentina Esperanto- Instituto, 1986. 72 p. 19 cm. Mimeo. Broŝ. Traduko de fama rakonto de la skota literaturisto.
— Cigno-kanto, Franz Schubert (1797—1828). Trad. Mad Mevo. 15 cm. Mimeo. Broŝ. Tradukoj de 14 kantoj konsistigintaj la lastan ciklon de la komponisto. Sen muziknotoj.
— En la mirinda mondo de la kino, Donĉo Hristov. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1985. 212 p. 16 x 22 cm. Ilus. Rakontoj pri personaj spertoj en la kinoarto, celitaj por junuloj kaj tradukitaj el bulgara originalo de la aŭtoro mem.
— Filozofio zoologia (1809), Lamarko (1744 — 1829). El la franca trad. Valo. Laroque: SAT-Broŝurservo, 1987. 137 p. 21 cm. Mimeo. Traduko de la plej grava antaŭdarvina verko pri biologia evoluo.
— Kaj poste, Daphne Lister. Manĉestro: Esperantaj Kajeroj, 1986. 56 p. 1,45 cm. ISBN 0 9505323 55. Dua originala poemaro.
— Konflikto, La, F. Le Dantek, el la franca trad. E. Lanti, kaj Dubi kaj aliaj artikoloj, Alen, el la franca trad. Herezulo. Laroque: SAT-Broŝurservo, 1987. 136 p. 21 cm. Mimeo. Diskuto pri la respektivaj meritoj de religio kaj ateismo por kompreni la mondon.
— Kiel diri . . .?: Praktika Esperanta frazeologio, Lentaigne. Laroque: Cercle espéraniste de l'Agenais, 1987. 148 p. 21 cm. Represo de la kvinmilvorta laŭtema frazaro.
— Kritikaj studoj defende de Esperanto, Ivo Lapenna. Kopenhago: Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado, 1987. 60 p. 30 cm. Kolekto de kvar kritikaj eseoj pri verkoj de J. V. Stalin, W. Solzbacher, Detlev Blanke kaj Peter G. Forster.
— Kurso pri rapida legado, Christian Bertin. Cesson-Sevigne: La aŭtoro, 1986. 114 p. 30 cm. Bele prezentita kun multaj ekzercoj.
— Malgranda Johano, La, Frederik van Eeden (1860 — 1932). El la nederlanda trad. Rejna de Jong. Chapecó: Fonto: 1936. 142 p. 21 cm. Fonto-Serio n-ro 13. Klasika psikologia fabelo pri maturiĝo de infano.
— Meteologia observatorio sur la monto Sonnblick, La, Walter Klag. Vieno: la aŭtoro, 1986. 8 p. 30 cm.
— Napravlenija sovremennoj interlingvistiki, S. N. Kuznecov. Moskva: Universitet drujby narodov im. Patrisa Lumumby, 1984. 99 p. 21 cm. Pri tendencoj en la nuntempa interlingvistiko.
— Nigra Spartako, La (1955), Geraldo Mattos. Chapecó: Fonto, 1986 (dua eldono). 56 p. 21 cm. Fonto-Kajeroj n-ro 1. Originala romaneto pri koloniigo de afrika regiono.
— Pri karboksilo, karboksaco kaj karboksato, M. T. Popov. Gundelfingen (FRG): G. & M. Westermayer, 1986. 8 p. 21 cm.
— Serĉu mian sonĝon, István Nemere. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 171 p. 20 cm. Romano de la populara verkisto pri juna geedza paro, kies amiko montriĝas esti teroristo.
— Sprog og sprog imellem, Preben Bagger. Skelby: Forlaget Komunikation og Kultur, 1986. 142 p. 21 cm. ISBN 87 87508 125. Danlingva prezento de la Esperanto-komunumo kiel modelo de egaleco en interkultura komunikado. Valora verko kun moderna aliro al la temaro.
— Stafeto-libroj, La, Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1986. 20 p. 21 cm. Katalogo de la eldonajoj de la plej grava postmilita Esperanto-eldonejo kun represo de Babilo pri Stafeto (1957) de J. Régulo Pérez.
— Ŝuisto de Gwidel, La Erwan ar Menga. Saint-Brieuc: Les Presses Bretonnes, 1986. 92 p. 21 cm. Ilus. Rakonto laŭ la bretonaj legendoj.

— Terminologia kurso, Jan Werner. Roudnice n. L.: Sdruženy klub ROH, 1986. 88 p. 21 cm. Sistema, rigore scienca enkonduko en terminologion.
— Terminologia vortaro, Rüdiger Eichholz (1922). Bailieboro: Esperanto Press, 1986. 50 p. 29 cm. ISBN 0 919186 31 9. Provtraduko de la Rekomendo 1087 de ISO kun aldonaj anglaj, francaj kaj germanaj terminoj kaj traduko de la Labordokumento: Reviziita versio de ISO 1087 kun ties angla versio.
— Ventolume, Debora Vaarandi (1916 —). El la estona trad. Hilda Dresen, Salme Kärner, Jaan Ojalo, kun enkonduka eseo de Karl Muru. Tallinn: Eesti Raamat, 1986. 142 p. 16 cm. Ilus. de Tiiu Allikvee. Kolekto de la plej grava estona poetino postmilita.
— Vetero kaj klimato de la mondo (1974), Denis Riley kaj Lewis Spolton. El la angla trad. Kris Long. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1987. 132 p. 25 cm. Ilus, ISBN 92 9017 0352. Renoma popularscienca verko, riĉe ilustrita.
— Kanto de kantoj, el la hebrea trad. André Cherpillod. Nanterre: la tradukinto, 1987. 128 p. 21 cm. ISBN 2-906134-03-1. Biblia poemo tradicie atribuata al Salomono; presita paralele kun la originalo kaj amplekse komentariita.
— Kiu kiam? Interlingvistika memor-kalendaro, ĉeĥoslovaka parto, komp. Jaroslav Mařik. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1987. 32 p. 21 cm. Jubilea Eldonserio 3. Esperantologio 21. Vivodatoj de aktivuloj kaj kronologieto.
— Knedu min sinjorino! Tabuaj kaj insultaj esprimoj en Esperanto, kompilis Renato Corsetti k. a. Pierrefitte: Kancerkliniko-teko, 1987 (neindikita). 23 p. 30 cm. ISSN 0398-5822. Glosaro de vortoj efektive uzitaj-uzataj.
— Komedio de eraroj, La, W. Shakespeare. El la angla trad. William Auld kaj Asen M .Simeonov. Glasgow-Sarajevo: Eldonejoj Kardo-ELBiH, 1987. 88 p. 21 cm. ISBN 0-905149-25-4. Frua ŝekspira komedio, pri duobla identec-konfuzo.
— Lasta virino, La, Manuel Cofino. El la hispana trad. Arnoldo Aguila. Havano: José Marti, 1986. 188 p. 21 cm. Premiita kuba romano pri amo kaj lukto kadre de la revolucio.
— Leteroj el mia muelejo, La (1) (1986), Alphonse Daudet (1848 — 1897). El la franca trad. Camille Boumal. Speciala numero (384) de Franca esperantisto, sept. 1987. 52 p. 21 cm. ISSN 0775-7698. Viglaj rakontoj pri kamparana vivo, de franca majstro de tiu ĝenro.
— Lisao, La, Qu Yuan (ĉ. 342-ĉ. 282 a. K.). El la ĉina trad. Licius. Sendaj (Japanio): Sendai Esperanto-Asocio, 1987. 48 p. 19 cm. Ĉefverko de la unua granda ĉina poeto, kun paralela ĉina teksto, utilaj notoj kaj postparolo.
— Anglaj prepozicioj en Esperanto, J. W. Prent. Romford: SATEB, 1987 (neindikita). 20 p. 21 cm. Broŝ. Tradukkonsiloj.
— Almanako de bulgaraj esperantistoj, div. aŭtoroj, red. Asen Grigorov. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 141 p. 23 cm. ISBN 963-571-128-X. Originalaj poemoj kaj noveloj.
— Aspects psycho-pédagogiques de l'espéranto, Fredo Bosmans. Lieĝo: la aŭtoro, 1987. 21 p. 30 cm. Pri la propedeŭtika valoro de Esperanto.
— Baranya la mistera, Csaba Székely. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1985. 36 p. 20 cm. Ilus. ISBN 963-571-150-6. Historio kaj folkloro de la regiono ĉirkaŭ Pécs.
— Beletro, sed ne el katedro, G. Waringhien. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1987. 258 p. 21 cm. Serio „Stafeto", n-ro 4. ISBN 90-71205-3. Iom reviziita dua eldono de la klasika verko Eseoj I. — Beletro (Stafeto, 1956). Kleraj kritikaj studoj pri la Esperanta kaj alilingva literaturo.
— Bestoj kaj homoj, Bernard Golden. Pizo: Edistudio, 1987. 135 p. 21 cm. ISBN 88-7036-035-5. Dek tri noveloj, el kiuj pluraj gajnis premion en literaturaj konkursoj.
— Bibliografio de la franclingvaj literaturaj tekstoj tradukitaj al Esperanto, H. Gonin. Speciala numero (383) de Franca esperantisto, aŭgusto 1987. 56 p. 21 cm.
— Blinda birdo, La (2a eld.), István Nemere (1944 —). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 118 p. 20 cm. ISBN 963-571-104-2. Romano pri lando, kie regas subpremo kaj ŝtata maljusto; gajnis la premion Libro de la Jaro 1983.
— Blua hundo, La/El Perro Azul, Guillermo Osorio. El la hispana trad. Miguel Fernández. Madrid: Aguacantos, 1987. 25 p. 17 cm. Broŝ. ISBN 84-398-9017-5. Dulingva eldono; noveleto.
— Ĉernobil skuis la mondon. Kompilis kaj eldonis Esperanto-Disvastiga Studgrupo, Tokio, 1987. 92 p. 21 cm. Ilus. Leteroj kaj artikoloj de eŭropaj esperantistoj plus fantazia dialogo inter Zamenhof kaj Einstein, reage al la atomcentrala akcidento en aprilo 1986.
— Desislava ridetas, Giorgio Silfer. Milano: Literatura Foiro, 1987. 70 p. 21 cm. Ilus. Lirika poemaro kaj tri prozaĵetoj, plus postkomentario.
— Doktoro Braun vivas en ni kaj Kripto, Julian Modest. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 71 p. 20 cm. ISBN 963-571-205-7. Respektive kvarscena dramo pri persona-publika agdilemo kaj unuscena komedieto.
— Due vite, due lingue, Fabrizio A. Pennachietti. Vercelli: Gruppo Esperantista Vercellese, 1987. 10 p. 24 cm. Prelegeto de orientalisto-esperantisto pri la paraleloj inter Zamenhof kaj Eliezer Ben Yehuda.
— En barko senpilota, William Auld. Kun eseoj de Aldo de' Giorgi (red.), Juan Régulo Pérez, Edwin de Kock, Rejna de Jong. Majorie Boulton, Henri Vatré. Pizo: Edistudio, 1987. 874 p. 18 cm. ISBN 88-7036-030-4. Kompleta poezia verkaro de argumenteble la plej granda Esperanta poeto.
— Epigramoj, Jan Izydor Sztaudynger. El la pola trad. Jerzy Handzlik. Bielsko-Biala: Pola Esperanto-Asocio, 1987. 25 p. 20 cm. Mallongaj rimaĵoj de populara humuristo.

— Esperanto: l'image et la réalité, Claude Piron. Paris: CELCAV, 1987. 53 p. 21 cm. Dementо de la dek plej oftaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto, surbaze de sistema esploro.

— Esperanto per Post. Ein Kurs in 20 kurzgefaßten Lektionen, Dr. Arthur Baur. Schweizer Esperanto-Gesellschaft, 1987. 20 p. 30 cm. Mimeo. Mallonga enkonduka kurso, kun germanlingvaj klarigoj, tradukekzercoj en kaj el la germana.

— Esperantoterapio. Esperanto pro sana vivo, Fredo Bosmans. Lieĝo: la aŭtoro, 1986. 12 p. 30 cm. Krampita. Pri la psikoplibo-niga efiko de Esperanto.

— Halka (1847), S. Moniuszko/W. Wolski. El la pola trad. Antoni Grabowski (1857-1921). Kun enkonduko de Andrzej Pettyn. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1987. 16 + 38 p. 20 cm. Represo de la unua opertraduko en Esperanto, honore al la Jaro de Grabowski 1988.

— Historio de la kontraŭreĝima Esperanto-movado (japanlingva; 2a eld. reviziita), Y. Oosima kaj M. Miyamoto. Sanseido-Tokio, 1987. 390 p. 19 cm. Ilus. ISBN 4-385-35310-7. Reeldono de klasika studo el 1974; inter la plej detalaj nacimovadaj historioj.

— Jenino Markso: el ŝia vivo, Erika Kopietz (lingve reviziita de Hermano Bermano k.a.). Paderborn: Esperanto-Centro Paderborno, 1987. 32 p. 21 cm. Ilus. ISBN 3-922570-48-8. Biografieto pri la edzino de la aŭtoro de Kapitalo.

— Inico al la programado. Apliko al BASIC. Rennes: Club Espéranto Rennais, 1984. 36 p. 30 cm. Dulingva (kun la franca).

— Juraj terminologiaj problemoj, Ivo Lapenna. Kopenhago: Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj, 1987. 38 p. 25 cm. ISBN 87-982430-2-0. Kun aparta konsidero pri la Esperanta terminaro, de eminenta esperantisto-juristo.

— Eterna neologisma diskuto, La: Kalocsay kaj la sekvo, Herbert Mayer. Vieno: Krammer, 1987. 26 p. 21 cm. Kriterioj por la akceptebleco de neologismoj.

— Interkonatiĝu ni/Hajde da se upoznamo, Kosta Kuzman. El la serba trad. Boriša Miličević. 6 p. 21 cm. Ilus. Porinfana poemo pri la transirado de strato (dulingve).

— Lukio aŭ Azeno, Lukiano (ĉ. 120-ĉ. 180 p.K.). El la helena trad. Gerrit Berveling. Vlaardingen: Vlardingenaj Kajeroj (4), 1988. 40 p. 21 cm. Mimeo. Humura rakonto pri homo transformita en azenon; kun informriĉa enkonduko.

— Mały słownik polsko-esperancki/Malgranda vortaro pola-Esperanta, Kazimierz Tyminski. Varsovio: Wiedza Powszechna, 1986. 431 p. 14 cm. ISBN 83-214-0326-3. Unudirekta.

— Mistera lumo, Julian Modest, Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1987. 90 p. 20 cm. ISBN 963-571-188-3. Mallongaj, trankvilstilaj noveloj pri ordinaraj homoj.

— Nigra insulo, La (1956), Hergé (Georges Rémi, 1907 — 1983). El la franca trad. Jopetro Danvy. Paris: Esperantix, 1987. 62 p. 30 cm. Bildlibro. ISBN 2-907120-01-8. Misteraj okazaĵoj venigas la aventureman Tinĉjon al sinistra skota insulo.

— Nouveau cours d' espéranto, Edmond Ludwig kaj Renée Triole. Madrid: Heroldo de Esperanto, 1986. 194 p. 21 cm. Aŭtodidaktika metodo por franclingvanoj.

— Officiële situatie van het Esperanto onderricht in de wereld (1985), Germain Pirlot (1943). El Esperanto en la flandran. Wilrijk: Sonorilo, 1985. 36 p. Grafikajo. 21 cm.

— Okuloj estas fenestroj de l' koro/Oči su prozor srca, elektis kaj elserbigis Slobodan M. Mitrović el la kolekto de Vuk Stefanović Karagić (1787 — 1864). Novi Sad: Petar Stojanovič, 1987. 41 p. 20 cm. Ilus. Cent proverboj, dulingve.

— Praktika kurso de Esperanto, Hannah kaj Andrzej Pettyn. Warszawa: Ritmo: 1986. La kompleto entenas du librojn (po 220 paĝoj) kaj kvar sonkasedojn. Celita por pollingvanoj.

— Prepozicioj en Esperanto, La, Zhou Guangzhi. Chongqing: Sciencaj-Teknikaj Dokumentoj, 1986. 354 p. 19 cm. Detala Ĉinlingva gramatiko, kun multaj ekzemploj.

— Présentation de l' espéranto, Emmanuel Companys. Paris: Cours et Études de Linguistique Contrastive et Appliquée de Vincennes, 1984. 58 p. 21 cm. Lingvistika kursenkonduko plus dulingva resumo de rondtabla diskuto.

— Puphejmo (1879), Henrik Ibsen (1826-1906). El la norvega trad. Odd Tangerud. Hokksund: la tradukinto, 1987. 57 p. 24 cm. ISBN 82-991075-2-0. Fama norvega dramo, pri virino kaptita en sufoka geedziĝo.

— Rabeno de Bacherbach, La, Heinrich Heine (1797 — 1856). El la germana trad. Reinhard Haupenthal. Düsseldorf: Heinrich-Heine-Gesellschaft, 1985. 42 p. 21 cm. Malklasika traduko de fragmenta romano pri la sorto de la judoj en mezepoka Germanio.

— Rekomendoj X. 24, V. 24, V. 28 kaj V. 35 de CCITT, trad. Christian Bertin. Cesson-Sévigné: la tradukinto, 1987. 58 p. 21 cm. Normoj de la Internacia Telegrafia kaj Telefonia Konsultiĝa Komitato.

— Sepdek-sep ŝlosiloj por la japana civilizacio (1985), Tadeo Umesao k. a. El la angla trad. Geoffrey Sutton. Tokio: Japana Komisiono por la Centjara Jubileo de Esperanto, 1987. 353 p. 18 cm. Ampleksa eseetaro kompilita de renoma etnologo-esperantisto, kiu priskribas la historion kaj kulturon de Japanio; en modele flua traduko.

— Aŭstralia-Esperanta vortaro / Australian-Esperanto dictionary (1983), R. Harry kaj V. Guelting. Bentley: Aŭstralia Esperanto-Asocio, 1985. 26 p. 21 cm. ISBN 0 9595336 56. Unudirekta vortaro de la aŭstralia dialekto de la angla.

— Bulgara nuntempa poezio kaj prozo. Antologio. Sofia Pres, 1985. 236 p. 23 cm. Verkoj de 53 poetoj kaj 11 prozistoj.

— Diskurso pri la metodo (1637), Kartezio. El la franca trad. Eugené de Zilah. Chapecó: Fonto: 1985. 176 p. 21 cm. Biblioteko de filozofio Fonto. Esperanta-franca eldono. Traktaĵo pri la metodo bone gvidi sian racion.

— D-ro Jekyll kaj S-ro Hyde, Robert L. Stevenson. El la angla trad. Fernando de Diego. Chapecó: Fonto: 1985. 96 p. 21 cm. Fonto-serio 8. Romano pri la perdroga disdividiĝo de la hompersoneco.

— Elektita verkaro, Hristo Botev (1848—1876). El la bulgara trad. I. Dobrev kaj I. Sarafov. Sofia: Sofia Pres, 1986. 83 p. 19 cm. Poemoj kaj prozaĵoj de la plej granda bulgara verkisto.

— El mia vivo, Vitézslav Nezval (1900 — 1958). Trad. el la ĉeĥa J. Vondroušek. Třebić: Esperantista klubo en Třebić, 1985. 12 p. 29 cm. Fragmentoj el samnoma libro.

— Esperantaj legaĵoj elektitaj. Pekino: Pekina Esperanto-Asocio, 1985. 3 vol. 130 + 148 + 145 p. 18 cm. Riĉa kolekto de anekdotoj, beletrajoj kaj fakaj tekstoj kun notoj kaj vortklarigoj en la ĉina.

— Esperanta literaturo I, ĉefred. Cicio Mar. Wuhan: Eldonejo de Huazhong Universitato de scienco kaj teknologio, 1986. 134 p. 18 cm. Originalaj kaj tradukitaj literaturaĵoj.

— Esperanto en Aŭstralio 1905 — 1985; Historio de AEA, Ray Ross. Brisbano: la aŭtoro, 1985. 117 p. 26 cm. ISBN 0 9595 336 64.

— Estonto — ekologio — Esperanto, red. Hristo Marinov. Sofia: Bulgara Ekologia Societo kaj Bulgara Esperanto-Asocio, 1986. Dek unu studoj pri ekologiaj kaj futurologiaj problemoj. Dulingva (angla kaj Esperanta).

— Geschichte der Universalsprache Volapük, Johann Schmidt (1895 — 1977). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1986. 52 p. 29 cm. ISSN 0179-1060. Jubilea eldonserio IV; Interlingvistiko 7. Germanlingva historio de volapuko.

— Glacikovrita ponto, La, Ljuben Stanev. Trad. el la bulgara. Sofia: Sofia Pres. 1984. 145 p. 20 cm. Romano pri Georgi Dimitrov en nazia malliberejo.

— Gvidlibro pri Pekino, komp. Laj Hajlong. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 162 p. Ilus. 18 cm. Praktika manlibro por turistoj en la ĉina metropolo.

— Ĝenerala kibernetiko, inĝeniera kibernetiko, biokibernetiko, div. aŭtoroj, Péter Broczkó. Budapest: NJSZT, 1986. 210 p. 22 cm. ISBN 963 8431 48 2. Unua volumo de prelegoj (en Esperanto, angla aŭ franca) prezentitaj dum INTERKIBERNETIK '85.

— Ĝojoj de mia vivo, Josef Vondroušek (1904). Praha: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1984. 98 p. 20 cm. Mimeo. Elektitaj tradukoj el A. Jirásek, K. Čapek kaj J. Šmid.

— Interkultura kompreniĝo kaj internacia kulturo, div. aŭtoroj. Antverpeno: TEJO, 1986. 48 p. 20 cm. Labordokumento de la TEJO-seminario 1986 Strasburgo, kun i. a. prelegtekstoj.

— Internacionalas (1871) E. Pottier (1816 — 1887). Vilnius: Mintis, 1985. 38 p. 9 cm. La proleta batalkanto en ok lingvoj, i. a. Esperanto.

— Jeanne d'Arc au bûcher/Jana d'Arko ĉe la ŝtiparo, Paul Claudel. El la franca trad. André Cherpillod (1930). Nanterre: la tradukinto, 1986. 140 p. 21 cm. ISBN 2 90613 02 3. Dramo pri la lastaj vivhoroj de la sanktulino.

— Kantu! Kantu! 1, Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 160 p. 18 cm. Tekstoj kun muziknotoj de 10 Esperantaj, 15 ĉinaj kaj 100 alilandaj kantoj.

— Kiamaniere distingi la fungojn? Come distinguere i funghi?, Mario Simondetti. Italigis el Esperanto G. Barbieri. Antverpeno: Edizioni Gabrielli, 1986. 62 p. Ilus. 21 cm. Scienca eldonserio 2. Esperanta-itala eldono. Manlibro por lerni distingi la venenajn fungojn disde la nevenenaj.

— Konvekseco en kompleksa analitiko unudimensia, Christer O. Kiselman. Uppsala: Upsala Universitato, 1986. 66 p. 30 cm. Lekciaro pri matematikaj funkcioj, kun ekzercoj kaj referencoj.

— Kuba ŝtata organizo, Domingo Garcia. El la hispana trad. Kuba Esperanto-Asocio. Havano: José Marti, 1985. 146 p. 21 cm. Ĝenerala priskribo pri la organizado de la ŝtato en Kubo.

— Kvarfolio, J. Karen (trad. J. Kořinek), J. Rumler, E. Urbanová, C. Vidman. Literatura suplemento al Paco. Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1985. Versoj de poetoj de la praga artliteratura skolo.

— Libro de Adoro, La, Geraldo Mattos, Chapecó: Fonto, 1985. 80 p. Ilus. 21 cm. Fonto-serio 7. Sonetaro, daŭrigo de „La Libro de Nejma".

— Loĝeja cirkonstanco tra la mondo, kompilis kaj eldonis Meguro-Esperanto-Societo (Tokio), 1987. 46 p. 30 cm. Ilus. Rezultoj de internacia enketo el 1984; dulingva eldono.

— Majstro kaj Margareta, La, Kris Long surbaze de la ruslingva verko de Miĥail Bulgakov. Pierrefitte: La Kromkancerkliniko, 1987. 34 p. 30 cm. ISSN 0398-5822. Kvinjamba senrima resumo.

— Plena ilustrita vortaro de Esperanto kun suplemento, ĉefred. G. Waringhien (1901 —). Paris: SAT, 1987 (4a eld., pliampleksigita). 1392 p. 20 cm. Bind. Ilus. E. Støp-Bowitz. Normiga verko, la plej ampleksa vortaro de la Internacia Lingvo; kun nova 45-paĝa Suplemento.

— Plena ilustrita vortaro de Esperanto. Suplemento, R. Levraud kaj G. Waringhien. Paris: SAT, 1987. 45 p. 20 cm. Grava aldono al PIV, enhavanta precipe (sed ne nur) teknikajn vortojn.

KORESPONDDEZIROJ

Bulgario

Rumjana K. Tačeva, ĵ. k. „Hipodruma", bl. 1, et. 2, ap. 6, **Sofio 1612**, 27j., dez. kor. tutmonde pri literaturo, kino, turismo, arto; kol. bk. pm, esperantajojn.

26j. inĝeniero dez. kor. pri historio, sporto, vojaĝoj, moderna muziko; kol. bk, turismajn prospektojn, insignojn: Valentin Genčev, **Sofia 1680**, Krasno selo, bl. 215, vh. E, et. 2, ap. 96.

Činio

Redaktoro, 41j., dez. kor. pri literaturo: Deng Huijin (Esperanta Literaturo), P.O. Kesto 8815, **Shashi,** Hubei

Shashi, Hubei

La redakcio de Esperanta Literaturo dez. interŝ. literaturajn librojn tutmonde, E-literaturo, P. O. Kesto 8815, **Shasi,** Hubei

GDR

Komencantino, 54j., dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, ĉiutaga vivo: Helga Freyer, Meininger Str. 20, **Wasungen 6104**

Renate Szymoniak, H.-Hertz-Str. 1, **Greifswald 2200;** 40j.; dez. kor. tutmonde pri vivkutimoj, ĉiutaga vivo, E-movado

22j.-Go-ludanto dez. kor. tutmonde pri muziko, literaturo: Klaus König, Hermannstr. 16, **Augsdorf 4251**

22j. komencanto dez. kor. pri turismo, sporto, šako, kulturo: Detlef Groth, Werneuchener Str. 12a, **Berlin 1092**

18j. lernantino dez. kor. tutmonde pri turismo, sporto, muziko: Angela Schütz, Hübnerstr. 7, **Berlin 1034**

Čehoslovakio

36j. edzo kun 2 infanoj dez. kor. tutmonde kun seriozaj esperantistoj p. ĉ. t. kaj laŭ ebloj interkonatiĝi persone: Pavel Jačka, Havličkova 3887, **Kroměřiž 767 01**

40j. flegistino dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.; kol. bk, pm: Blanka Faltýnková, Školská ul. 321, **503 02 Předměřice n. L.**

Ladislav Dvoraň, **Sezimovo Ústi II.** str., K hájence No 675, CS-391 02; 57j.; dez. kor. kun geesp. mezjaraj pri sporto, fotado, muziko; kol. bk, pm, kalendarojn, suvenirojn

Sekcio de ĉeĥaj esp.-invalidoj dez. kor. kun invalidaj esperantistoj el GDR. Skribu al: Vaclav Němeček, Mračnická 1054, **102 00 Praha 10**

Anoj de kursoj por komencantoj k progresantoj en Hradec Králové dez. kor. tutmonde. Skribu al: Karel Kopecký, Vítězná 1042, **503 46 Třebechovice pod Or.**

40j. vinberkulturisto dez. kor. pri turismo, filatelio, historio; kol. pm: Dušan Juran, **951 21 Rišnovce 132**

Božena Pazúriková, Leninova 152/9, **02901 Námestovo,** okr. Dolný Kubin, 20j. dez. kor. kun gejunuloj pri literaturo historio, sporto, turismo, nuntempa muziko

30-jara instruistino korespondus tutmonde pri ĉiuj temoj: f-ino Júlia Marianková, Partizánska 144, **916 24 Horná Streda**

17-jara studentino korespondus tutmonde pri ĉiuj temoj: f-ino Alexandra Valjašková, Čajakova 6, **010 01 Žilina**

30-jara esploristino korespondus tutmonde pri ĉiuj temoj : f-ino Ing. Beáta Blašková, Pažite 35, **010 09 Žilina**

20-jara grafikisto korespondus tutmonde pri ĉiuj temoj: s-ro Richard Lapšanský, Bajzova 21/78, **010 01 Žilina**

12-jara lernanto korespondus tutmonde pri paperaj kaj plastaj modeloj kaj pri naturo: Juraj Hreusík, Gaštanová 5, A2/30, **010 01 Žilina**

39-jara esploristo korespondus tutmonde pri naturo: Inĝ. Juraj Hreusík, Gaštanová 5, A2/30, **010 01 Žilina**

30-jara esploristo korespondus kun najbaraj landoj kaj kun angle parolantaj landoj pri naturo, tehniko, sporto kaj kulturo: Inĝ. Tibor Penzeš, Borová 29, **010 01 Žilina**

45-jara instruistino korespondus tutmonde pri ĉiuj temoj: s-rino Emília Koledoná, Severná 25, **010 01 Žilina**

4-membra familio (37+37+13+10j.) korespondus tutmonde pri ĉiuj temoj: s-rino Inĝ. Silvia Gaštanová 12, **010 01 Žilina**

25-jara esploristino korespondus tutmonde kun junaj homoj: f-ino Inĝ. Soňa Rafajová, Pri Kysuci 5, **01003 Žilina**

28-jara oficistino korespondus tutmonde pri ĉiuj temoj: s-rino Lubomíra Kapalová, Velká Okružná 17, **010 01 Žilina**

Kubo

Virinoj de E-grupo en Habana dez. kor.:

— Naney Cabera Cruz, Calle 25, **2604 Quivicán**
— Gladys Pérez Pineiro, Calle 26, **2511 Quivicán**
— Jacqueline Pérez López, Ave: 17, **1414 Quivicán**
— Mariluz Cartón Silur: Ave: 21, **2006 Quivicán**
— Iraida Rodriguez Revez, Ave: 17, **1409 Quivicán**
— Carmen Julia Calvo Granados, Calle 5, 25, San Felipe, **Quivicán**
— Odilia Tabares Rodriguez, Ave: 19, **3005 Quivicán**
— Mayte Acosta Hernandez, Calle 30, **2708 Quivicán**
— Alina Gonzales Garcia, Calle 6, 205, San Felipe, **Quivicán**
— Caridad Hernandez Gléz, Calle 8, 8812, Guiro, Bonigal, **Quivicán**

Japanio

38j. komercisto, loĝanta en Tokio, dez. kor. kun geesp. el GDR: Anthony Magan, Room 401, Eagle Building 5-1, 5-Chome, Shinbashi Minato-ku, **Tokyo** 105

Usono

Profesoro de geologio, 54j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: D-ro Robert Simmondo, 122A RDNo 1, Oneonto **NY 13820**

Vjetnamio

F-ino Lê thi Ngoc Thuy, **525/278 Huynh van Danh F. 14** — Phú Nhuân — TP. **Ho Chi Minh,** 21j., dez. kor. pri arto, muziko, literaturo, turismo, kol. pm, bk

F-inoj Truong thi My Vân (25j.) kaj Truong thi My Dung (23j.) **112/34/1 Dinh Tiên Hoàng F. 1** — Dinh Thanh TP. **Ho Chi Minh,** dez. kor. tutmonde pri literaturo, muziko, turismo, pentroarto

F-ino Bang Thi Kim Hong, **49D1/8 Nguyen Duy F. Q. 8** — TP. **Ho Chi Minh,** 26j., dez. kor. pri sporto, muziko, turismo

25 kampučiaj gestudentoj dez. kor. tutmonde p. ĉ. t. Grupestro: s-ro Vann Sophea, Ký túc xá Thanh Quan — 232Bis/C-Va Thi Sáu — Q. 3 — TP, **Hó Chi Minh.**

Pollando

Komencantino, 17j. lernantino dez. kor. tutmonde pri muziko, literaturo, lingvoj: Dorota Mazurek, ul. Kruczkowskiego 20/9, **20-468 Lublin**

62 j. komencanto dez. kor. tutmonde pri filatelo, kol. pm: Rikardo Piotrowski, str. Zwakowska 12/3, **43-100 Tychy**

Komencanto, 38j. laboristo, dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, folkloro, kol. pm: Jan Saliński, L. Czarnego 13/33, **977-500 Radom**

Komencantino, 28j. oficistino, dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, kol. bk: Grazyna Kościewska, str. Strzainowa 1 B m 4, **87-100 Torun**

24j. komencanto dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, sporto, muziko, kol. bk, pm: Sławomir Szczygieł, ul. Bałtowska 323, **27-400 Ostrowiec**

Komencantino, 27j. bibliotekistino, dez. kor. tutmonde pri literaturo, turismo, kol. bk: Iwona Broniewska, PCK 9 m 7, **40-057 Katowice**

Maria Baczyńska, **89-600 Chojnice,** ul. Konopnickie 2/2, 29j., dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, geografio, kol. librojn, bk

Komencanto, 40j., dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, kol. bk, turismajn prospektojn: Lucjan Marciniak, Dziwiszów 203, **58-513 Dziwiszów**

Komencanto, 21j. studento, dez. kor. tutmonde pri turismo, sporto, literaturo, folkloro, kol. pm, bk, turismajn prospektojn, il. revuojn Maciej Łucka, **90-202 Łodz,** str. Nowotki 23/13

Komencantino, 22j. instruistino, dez. kor. tutmonde pri muziko, turismo: Barbara Binieda, **87-207 Debowa Koka,** woj. toruńskie

30j. kuracistino dez. kor. tutmonde pri turismo, sporto, literaturo: Beata Pociask, **28-100 Busko-Zdrój,** os. Sikorskiego 7/14

Komencanto, 19j. lernanto, dez. kor. tutmonde pri turismo, sporto, muziko, biologio, kol. pm: Piotr Januchta, **02-130 Warszawa,** ul. Gorlicka 4A m 117

Komencanto, 47j. laboristo, dez. kor. tutmonde pri fiŝkaptado, kol. bk, pm: Franciszek Sułek, ul. Mszczeonowska 21/33, **96-100 Skierniewice**

Witold Szpytman, Reczpol 150, **37-755 Krzywcza,** 19j. dez. kor. tutmonde 39j. astronomo dez. kor. tutmondo pri astronomio muziko: Andrzej Pilski, ul. Katedralna 8, **14-530 Frombork**

Komencanto 23j. dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, pentroarto: Lidia Shomglas, **21-011 Łucznów 29A,** woj. Lubelskie

Komencantino, 28j. oficistino, dez. kor. tutmonde pri literaturo, psikologio, turismo, kol. librojn, bk: Kazimiera Pajak, Kurów 155A, **34-233 Hucisko**

Komencantino, 30j., dez. kor. p. ĉ. t.: Bozena Gmurczyk, ul. Kołowa 19/21 m 29, **93-142 Łódz**

Komencanto, 25j. inĝeniero dez. kor. tutmonde pri fotoarto, turismo: Dorota Szarek, **39-400 Tarnobrzeg,** str. Warýnskiego 5 m 5

24j. flegistino, komencantino, dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, medicino: Barbara Lesien, **70-412 Szczecin,** ul. Niedpodległkości 30/2

31j. oficistino, komencantino, dez. kor. pri turismo, kol. pm: Ewa Zaworska, ul. Kilinskiego 30/31, **62-300 Września**

Junulo, 15j. dez. kor. tutmonde pri tekniko, libroj, revuoj, kol. pm, bk, glumarkojn: Leszek Sobnowiak, ul. Boczna 7/25, 67-400 Wschowa, woj. Leszczyńskie

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080
Fernruf: 2 82 63 43
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Joachim Schulze. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16